

eLIBRO

Åke Holmberg

Ture Sventon en Londono



INKO



Åke Holmberg

TURE SVENTON EN LONDONO

El la sveda tradukis

Malte Markheden

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

Ĉi tiu eLibro ekzistas ankaŭ en presita versio. Aĉetu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (www.uea.org) aŭ vialanda libroservo.

ISBN 91-7303-055-4

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

DECEMBRO 2000

La zorgoj de lordo Hubardo

Estis novembra vespero en Londono. La stratoj estis en volvitaĵoj en la plej densa nebulo. Lordo Hubardo, kiu loĝis en Holanda Parkavenuo 104, kuŝis en sia lito kaj legis. Li estis proksimume kvindekjara kaj havis pendantajn ruĝbrunajn lipharojn. Li ĵus estis malsupre en la kuirejo kaj pretigis al si tason da varma, bongusta teo. Estis merkredo, pro tio kaj Johana kaj Betio estis liberaj. Li estis sola en la domo kun siaj du genevoj Maria kaj Diko. Ĉio estis kvietaj kaj trankvilaj. La lordo turnis la foliojn de la libro — ĵus eldonita detektiva romano kun la nomo "La murdo en la tekruĉo". Li trinketis de la teo kaj metis la piedojn kontraŭ la agrablan litvarmigilon.

Tiam li aŭdis sonon en la koridoro. Li mallevis la libron kaj aŭskultis. Nun ĝi ree aŭdiĝis. Lordo Hubardo pensis, ke devas esti Maria aŭ Diko, kiuj ellitiĝis. Li memoris, ke oni hodiaŭ manĝis sekprunojn kun kremo kiel deserto. Tute nature, li pensis, sed mi tamen esploru, kiel ili fartas.

Li surmetis sian noktosurtuton, prenis poŝlampon el la noktotablo kaj eliris en la koridoron. La lumo estis estingita, kaj nun neniam sono estis aŭdebla. Li eniris al la infanoj. Ili kuŝis kaj dormis snufante, tiel ke ili forte ŝvitis.

Strange, li pensis kaj plueniris en la halon. Li eklumigis la lampon kaj vokis trans la ŝtupara balustrado:

—Hola, ĉu iu estas tie?

Neniu respondis. Nu, certe estas iu natura kialo, li pensis.

En la sekva tago li sidis en la biblioteko kaj pritraktis nepagitajn fakturojn. Li ekĝemis kaj pensis, ke li tamen devos skribi al sia onklino Viktoria. Domaĝe devi ĝeni ŝin, kiam ŝi estas forvojaĝinta, sed li kiel kutime ne vidis alian rimedon. La edzo de Viktoria Smito dum sia tempo estis konata pro siaj kalsonoj — tio estas, li produktis kalsonojn, li fondis fabrikon kaj produktis amason da kalsonoj. Nun ŝia filo transprenis la entreprenon, kaj li fabrikis eĉ pli da kalsonoj. Ĝuste nun li kaj lia edzino estis forvojaĝintaj. Temis pri kalsonoj. Estis negocvojaĝo. Kaj pro tio iliaj infanoj Maria kaj Diko loĝis ĉe li.

Li ĝuste volis skribi leteron al onklino Viktoria, kiam Joanna, la kuiristino, venis en la bibliotekon en sia granda blanka antaŭtuko.

—Estas io malĝusta ĉi tie en la domo, ŝi diris, kaj lordo Hubardo kun teruro rimarkis, ke ŝi en la vizaĝo havas ĝuste tian esprimon, kian kuiristinoj kutimas havi, kiam ili avizas sian eksigon.

—Ĝus kiam mi estis vokonta la buĉiston pri bovrostaĵo, fremda viro staris ĉe la telefono. Nun ĝi estas riparita, li diris. Kio estas riparita? mi demandis, kaj mi pentis, ke mi ne kunprenis la ferpistilon. La telefono, li diris. Nun vi jam povas telefoni, li diris. Ĝi neniam estis difektita, mi diris, sed tiam li foriris. Li nur malaperis.

—Strange, diris lordo Hubardo kaj suĉis sian pipon, sed ĝi certe havas sian naturan kialon, li aldonis kaj eligis pacan fumnubon.

La kuiristino foriris malbonhumore murmurante.

En la sekva mateno lordo Hubardo envenis en la halon, kiam Beti polvosuĉis la tapiŝon. Li portis kvadratumitan kostumon kaj liaj ruĝbrunaj lipharoj pendis kiel kutime.

–Bonan matenon, Beti, li diris. Kian veteron ni havas hodiaŭ?

–Tion mi ne scias, sed ĵus estis fremda viro en la banĉambro, ŝi diris, kaj lordo Hubardo kun teruro rimarkis, ke ŝi havas ĝuste tian vizaĝan esprimon, kian ĉiuj liaj hejmhelpantinoj havis, kiam ili avizis sian eksiĝon. Tio ne povis esti en ordo.

–Fremda viro en la banĉambro? Aŭdiĝas malagrabla. Ĉu Beti estis bananta sin?

–Ne, mi ne estis, ŝi diris. Mi estis purigonta la bankuvon.

–Nu, sed tiaokaze ja ne estis io danĝera, lordo Hubardo diris kuraĝige.

–Li diris, ke ĝi nun estas aranĝita. Kio do? mi demandis. La defluilo, li respondis. Nun vi povas ree baniĝi. Kaj li malaperis. Sed neniam estis difekto je tiu defluilo.

–Nu, lordo Hubardo diris trankvilige, certe estas iu natura kialo.

Beti nenion respondis. Ŝi daŭrigis la polvosuĉadon.

Vespere li ree sidis en la biblioteko kaj kontrolis siajn fakturojn. Nun mi vere devas skribi al onklino Viktoria, li pensis. Ne povas plue prokrasti tion.

Tiam li subite rimarkis, ke paro da ŝuoj elstaras de sub la kurteno. Li sidis senmove kaj pensis. Ankaŭ la ŝuoj ne moviĝis. Eble la ŝuoj estas armitaj, li pensis kaj silente levis sin en la seĝo. Li piedpinte iris el la ĉambro kaj ŝlisis la pordon kiel plejeble silente. Li suprenkuris al sia dormĉambro, havigis pistolon el la noktotabla kesto kaj returnis malsupren. Li levis la pistolon kaj malfermis la pordon.

La ŝuoj estis for. Li rigardis malantaŭ la kurtenoj, kaj li rigardis ĉie en la ĉambro. Neniu estis tie. La biblioteko havis

nur unu pordon, kaj la fenestroj estis bone fermitaj, la hokoj estis surmetitaj. Malgraŭ tio la ŝuoj ne plu restadis en la ĉambro.

Lordo Hubardo sidiĝis en seĝon kaj cerbumis.

Nu, li pensis, kiam li longe cerbumadis kaj ne trovis klarigon, kredeble ekzistas iu natura kialo.

Privatdetektivo T. Sventon, Stokholmo

Ĉe Reĝina Strato en Stokholmo Ture Sventon havis sian oficejon. En la pordego estis ŝildo, sur kiu oni legis:

TURE SVENTON **Privatdetektivo**

Estis multaj homoj, kiuj eniris tra la pordego, kaj plej multaj estis survoje al Sventon. Li havis grandan klientaron. En novembra tago viro kun pendantaj lipharoj kaj kvadratumita kostumo eniris tra la pordego. Li portis valizon.

Li sidiĝis en la atendejo de la privatdetektivo. Tie kiel kutime estis neordinare multaj homoj, kaj tio estis nenio mirinda. Ĉiuj sciis, ke T. Sventon estas la plej lertega privatdetektivo, kiu iam ekzistis ĉe la malsupra parto de Reĝina Strato en Stokholmo, jes en la tuta lando. Li estis tute superŝutita de komisioj. Ĉie oni vidis lin. Ekzemple oni supozu, ke familio en Katrineholmo subite rimarkas, ke ilia piano malaperis el la manĝoĉambro. Oni serĉas ĝin en ĉiuj ĉambroj, oni serĉas en la subtegmentejo kaj en la kelo, sed la piano estas for. La manĝoĉambro aspektas tre dezerta. Tiaj okazoj estas pli oftaj, ol oni volas kredi. La plej saĝa, kion oni povas fari en tia kazo, estas turni sin al T. Sventon, Stokholmo. En la sekva tago oni tute ne miru, se oni sur iu el la kvietaj stratoj en Katrineholmo renkontas ĝardeniston, kiun oni antaŭe ne vidis

tie. Estas Sventon, kiu esplorrigardas. Li havas kelke da pere-
noj sub la brako, sed oni rekonas lin pro lia tranĉilakra pro-
filo.

En la venonta tago eblas, ke oni renkontas lin en iu el la
plej fekundaj agrardistriktoj de Skanio, kie li ĉirkaŭrigardas
pri malaperinta sterkodiŝetilo.

Jes, Sventon aperis en la plej neantauviditaj lokoj, kaj tio
dependis de la fakto, ke li posedas flugantan tapiŝon. Kom-
preneble fervojoj estas konvenaj, kiam temas pri vojaĝoj. An-
kaŭ aŭtoj povas esti bonaj. Kaj kompreneble ankaŭ aviadilo
povas esti praktike utila, se temas pri vojaĝo inter du mal-
proksimaj lokoj. Sed vera araba fluganta tapiŝo estas io tute
alia. En nia lando ĉi tiuj praktikaj tapiŝoj neniam akiris suk-
ceson. En la Proksima Oriento kun ĉirkaŭaĵo oni ofte vidas
ilin. En la arabaj urboj kun siaj svarmantaj homamasoj eĉ
estas specialaj parkejoj por la tapiŝoj.

Ture Sventon estis aĉetinta la tapiŝon de sinjoro Omaro,
kiu loĝas en la Araba Dezerto. Kaj poste li povis surteriĝi kie
aj. Ekzistis spertaj enrompŝtelistoj, kiuj opiniis, ke ŝtelado ne
plu donas profiton. Ekzemple Franco Briljanto kaj Tomaso
Larsono. Ili renkontiĝis en iu nokto ekster unu el la malmultaj
juvelistfenestroj, kiujn ili ankoraŭ ne rompis. Briljanto kun-
havis grandan rompilon, kaj Tomaso havis pli malgrandan
faldeblan modelon en la poŝo. Krom tio ili havis pli ol 300
ŝtelŝlosilojn en la dorsako. Briljanto elprenis el la dorsako
ŝtrumpon plenan de sablo. Li levis ĝin por disbati la fenestro-
vitron, kiam Tomaso ekpensis pri io.

—Vi! Atendu momenton! Ekpensis pri io. Sventon!

—Aj! Vi diris ion, Tomaso! Sventon, jes. Tio ne donos profi-

ton. Mi pensas, ke mi anstataŭe prenos laboron en iu brullig-
nejo.

—Jes, mi opinias, ke vi faru tion, Briljanto. Kaj mi serĉos la-
boron en iu rapidekspedejo.

—Tio estas la plej saĝa afero, kiun vi povas fari. Jes do, bo-
nan nokton!

—Bonan nokton! Salutu vian edzinon!

—Dankon, la samon reciproke!

Ili malgajaj foriris, ĉiu al sia direkto.

Lordo Hubardo ĉe Ture Sventon

Fraŭlino Jansono, la sekretario de Sventon, malfermis la pordon al la ĉambro de la privatdetektivo. Ŝi tenis duonpretan pototuketon en la mano. Kvankam ŝi havis tiom da laboro, ŝi tamen sukcesis kroĉtriki pototukojn, kiujn ŝi ĉiujare donis al siaj fratinoj kiel kristnaskdonacoj. Ŝi estis tre kapabla.

La fremdulo en la kvadratita kostumo envenis kun la valizo en la mano kaj diris, ke li estas Lordo Hubardo.

—Sventon, diris Sventon. Bonvolu sidi! Pri kio temas?

—Agrabla vetero hodiaŭ, diris lordo Hubardo kaj sidiĝis.

Sventon rigardis gardeme tra la fenestro. Estis grize kaj malvarme kaj cetere nebulo en la aero.

—Estas nebule, li diris.

Ankaŭ lordo Hubardo rigardis tra la fenestro, sed li ne povis rimarki nebulon. Kiam lordo Hubardo parolis pri nebulo, li celis nebulon. Per nebulo li celis ion, kio similas al densa novfiltrita lakto, fluido, en kiu oni tuj erariris. Sur Reĝina Strato li ne povis rimarki ion, en kio oni povis iri erare.

Sventon ankoraŭfoje demandis, pri kio temas la afero.

—Povus esti pli malbone. Akceptebla vetero entute, lordo Hubardo diris kaj frotis la manojn. Li ekbruligis sian pipon kaj elsendis hejmeĉan fumnubon.

T. Sventon rigardis la horloĝon.

—Estas loĝanta en Londono, daŭrigis Hubardo. Havas domon ĉe Holanda Parkavenuo.

Sventon tiris al si notblokon kaj notis tiujn faktojn.

—Ĉu io estas ŝtelita? li demandis.

—Ne, nenio laŭ mia scio. Mankas al mi nenio. Mi traser-
ĉis ĉiun moveblan havaĵon laŭ la inventaro.

—Ĉu la inventaro estas fidinda? Sventon demandis. Eble ĝi
estas malnova?

—Ho ne, ne tre malnova. Ĝi estas de la jaro 1881, kiam mia
avo mortis. La sama jaro, en kiu Ruĝa Vulpo fariĝis dua en la
ĉevalkonkurso Granda Nacia.

—Pri kio do temas? diris Sventon. Li eligis sian poŝhorlo-
ĝon kaj klakige metis ĝin sur la tablon.

—Por rekte paroli, diris lordo Hubardo kaj suĉis sian pipon,
la tuta historio estas tre stranga. Tute ne povas klarigi ĝin.

—Mi tre urĝas, T. Sventon diris.

—Tiuokaze mi rapidos. Kiel dirite mi tute ne povas vidi kla-
rigon.

—Al kio?

—Evidente iu kaŝiras en la domo dum la noktoj. Kaj ankaŭ
dum la tagoj, mi volas kredi.

Sventon notis tion.

—Imageble estas, lordo Hubardo daŭrigis, ke estas domra-
bisto, kiu ankoraŭ ne decidis sin. Li eble volas elekti kaj ne
trorapidi. Ĉar estis loko en la valizo, mi kunprenis iom de la
plej valoraj objektoj, por ke ili estu sekuraj, kiam mi estas for.

Lordo Hubardo montris, kion li havas en la valizo. Unue li
metis tri kamizolojn sur la skribtablon.

—La plej valoraj objektoj! ekkriis Sventon. Aha! estas mal-
multe da kamizoloj en Britio! Ĉu eble ne aĉeteblaj nuntem-
pe?

—Kamizoloj? Malmultaj? diris lordo Hubardo kaj levis la

brovojn. Tion mi ne povas kredi. Estis ĵus ĉe Jaksono & Andreo ĉe Bondostrato. Tie vere ne estis manko. Vojaĝos al Stokholmo, mi diris, kaj mi ne scias, kian veteron ili havas tie. Donu al mi tri kamizolojn por eviti riskon.

—Pluen! diris Sventon kaj rigardis malpacience en la valizon.

—Tra la pordo mi povis rigardi en pli internan ĉambron, speco de provizejo, kaj tie estis amasoj da kamizoloj, preskaŭ ĝis la plafono.

Sventon tamburis senpacience sur la tablo.

—Ankaŭ aŭdis hazarde tra la pordo telefonan interparolon, Hubardo daŭrigis ne konsterniĝinta. El Manĉestro. Ili estis sendintaj plenvagonon da kamizoloj! li diris kaj triumfe rigardis Sventon. Kial li por ĉio en la mondo kredas, ke estus manko de kamizoloj en Britio? li pensis.

Poste li elprenis arĝentan kuleron, per kiu lordo Nelson kiel infano ne volis manĝi la kaĉon. Plue ege valoran salujon kun kovrilo kaj entenanta iom da salo, kiun reĝino Viktoria iam kredis esti sukero, kaj tial ŝia rabarbkompoto estiĝis tute nemanĝebla. Plue etan pentraĵon, kiu ankaŭ estis eksterordinare valora.

—Ĝi estas pentrita de nekonata majstro, lordo Hubardo diris.

—Nekonata? Kiel oni do scias, ke li estis majstro? Sventon akre demandis kaj rigardis la pentraĵon. Ĝi prezentis nenion specialan. Ĝi estis tiel malnova, ke ĝi estis tute nigra. Ĝi estis pentrita en la jaro 1323. Kelkaj esploristoj opiniis, ke ĝi prezentas "La fuĝon al Egiptio", aliaj opiniis, ke ĝi montras "Mantenmanĝon en la arbargardista kabano".

—Opinias, ke ŝajnas esti motorciklo ĉi tie, diris la lordo kaj montris al eĉ pli malhela parto.

—1323, Sventon singarde diris. Absolute ne. Tiam ne ekzistis motorcikloj.

Lordo Hubardo penseme rigardis tra la fenestro.

—Estas vero, li diris. En tiu jaro unu el miaj prapatroj estis senkapigita. Kaj li ne posedis motorciklon. Tio estas ĝusta. Roberto Hubardo. Li ĉiam estis implikita. Estis senkapigita.

T. Sventon, Stokholmo, eligis etan bedaŭran tusadon pro la malgaja sorto de Roberto Hubardo.

Kiam lordo Hubardo ankaŭ estis elplukinta dekduon da pezaj arĝentaj kuleroj, verdstrian piĵamon kaj "La murdon en la tekruĉo", li remetis ĉion en la valizon.

—Kiu j loĝas en la domo? demandis Sventon.

—Ĝuste nun estas mi kaj mia eta nevino Maria kaj mia nevo Diko. La gepatroj estas forvojaĝintaj. Negocvojaĝo. Temas pri kalsonoj. Ĉu sinjoro Sventon eble konas la firmaon Smito, Smito, Smito & Smito?

—Tre bone, diris Sventon ĝentile, kvankam li ne povis memori, ke li aŭdis ion pri la kalsonoj de sinjoroj Smito. Ĉu unuaklasa varo?

—Mi ne scias tion. Opinias, ke estas nura rubaĵo. La edzo de mia onklino tamen gajnis grandan monon per siaj kalsonoj. Estis nobeligita pro la afero. Cetere en la sama jaro, kiam Oksfordo venkis Kembriĝon ĝuste sur la golfeja linio.

Sventon senpacience ĝemspiris.

—Supozas, ke sinjoro Sventon memoras Antonon Smiton, daŭrigis lordo Hubardo.

—Antonon Smiton? Sventon diris kun sulkigita frunto.

—Jes, li, kiu nun posedas la fabrikon. Mia bofrato. Li per-

dis 500 kalsonojn en Mjölby antaŭ kelkaj jaroj, kiam li estis je negocvojaĝo, kaj tion sinjoro Sventon solvis al li. Tial mi pensis, ke ankaŭ mi turnu min ĉi tien.

Antono Smito? Jes, estis tiel. Sventon nun memoris, ke fabrikestro Smito en tute neklarigebla maniero estis perdinta siajn kalsonojn. Kompreneble Sventon solvis la aferon. Post intensa esplorklaboro Sventon trovis la tutan kvanton en malgranda stacia vilaĝo en meza Svedio (sed tiam ĝi jam estis disigita kaj cetero la tuta kvanto estis uzita).

—Ĉu loĝas pli da personoj en la domo? demandis Sventon.

—Jes, mi havas domservistinojn, Beti estas ŝia nomo. Kaj ankaŭ la kuiristinojn Joana. Sed ĉefservistinojn ni ne havas. Bona ĉefservistino ne estas havebla eĉ per mono. La malnova honesta tipo de ĉefservistino malaperis.

—Aha! Sventon diris kaj notis, ke malnova honesta ĉefservistino malaperis. Li tute ne estis mirigita. Privatdetektivo kutimiĝis aŭdi, ke ĉio valora malaperas. Smeraldoj, diamantoj kaj ĉefservistinoj – ĉio malaperas pli-malpli baldaŭ. Kiam vi unue aŭdis la piedpaŝojn? li demandis.

—Estis vespero. La infanoj jam kuŝis. Ankaŭ mi mem ĵus kuŝiĝis. Kaj lordo Hubardo rakontis, kion li aŭdis en tiu vespero, kiam oni estis manĝinta sekprunojn je la tagmanĝo. En alia tago, estis bela kaj suna oktobrotago, li daŭrigis, mi sidis ene en la biblioteko, kiam mi subite ekvidis paron da ŝuoj elstari el sub la kurteno. Paro da ŝuoj. Fakte. Neniam antaŭe io tia okazis al mi. Mi kredis, ke estas Beti, do nia domservistino.

—Kial ŝi staris malantaŭ la kurteno? Ĉu ŝi kaŝludis? Sventon demandis malkonfide.

—Kaŝludis? diris Hubardo kun vera surprizo. Kiel tiu Sven-

ton povas kredi, ke Beti kaŝludis, li pensis. En la biblioteko? Kiam mi sidis tie kaj kontrolis (nepagitajn) fakturojn. Komplete ridinde. Stranguloj, tiuj privatdetektivoj.

—Ne, li diris, mi kredis, ke Beti pro iu kaŭzo metis paron da ŝuoj sub la kurtenon en la biblioteko, kiam ŝi purigis ilin.

—Ĉu ŝi kutimas fari tion?

—Jes, certe ŝi kutimas purigi ilin. Ŝi ĉiam faras tion ordeme, tion mi devas diri. Eble malzorgas iom la polvosuĉadon.

Ture Sventon estis ege okupita privatdetektivo, kaj li volis, ke vizitanto prezentu sian aferon per rekta parolo. Ankoraŭ li ne sciis, kion tiu vojaĝanta fremdulo volas de li. Sur sian blokon li estis notinta: Smito, Smito, Smito & Smito (malbonaj) kalsonoj – Maria, Diko, sekprunoj – piedpaŝoj – 1 paro da ŝuoj sub la kurteno. Kion signifis tio?

—Poste mi rimarkis, ke la kurteno moviĝas iom, lordo Hubardo daŭrigis.

—Aha! do estis rompŝtelisto, Sventon tuj diris. Li tute ne ekmiris. Praktikanta privatdetektivo estas alkiutimita, ke homoj staras kaŝitaj malantaŭ kurtenoj. Tio okazas ĉiutage. Kutime la ŝuoj tiaokaze havas pistolon en la mano. Priskribu la aspekton! li diris kaj altiris la blokon.

—Relative malhela kaj rekta kaj larĝa.

—Alta aŭ malalta?

—Tre alta. Ĝis la plafono kaj kun franĝo malsupre.

Sventon, kiu ordeme notis, retenis sin.

—Franĝo malsupre? li akre demandis. Mi neniam aŭdis pri rompŝtelistoj kun franĝo malsupre. Ĉu li havas franĝojn sur la pantalono?

Lordo Hubardo rigardis Sventon esplore. Strangaj uloj, tiuj privatdetektivoj. Oni neniam povas tute kompreni ilin.

—Ni ja parolis pri la kurtenoj, li diris. Ili estas el ruĝa veluro kun franĝoj malsupre. Mia patro aĉetis ilin en la sama jaro, kiam reĝino Viktoria festis sian jubileon.

—Kiu staris malantaŭ la kurteno?

—Tute fremda homo. Ne povas memori, ke mi antaŭe vidis lin.

—Priskribu la aspekton, por ke ni havu klaran personpriskribon, diris Ture Sventon.

—Mi vidis nur la pintledon de liaj ŝuoj. Tiuj estis tre pintaj kaj bone purigitaj.

—Pintaj pintledoj?! tio venis kiel serio da pistolpafoj de privatdetektivo T. Sventon, Stokholmo.

Ĉu povas esti Nivalo? Li ĉiam aperas en bone purigitaj pintaj ŝuoj kaj staras ofte kaŝita malantaŭ kurtenoj.

Nalo Nivalo estas konata de ĉiu praktikanta privatdetektivo. Ankaŭ de ĉiu nepraktikanta. Li estas la plej glata kaj malfacile kaptebla krimulo, kiun oni povas imagi al si. Nur Sventon iam sukcesis kapti lin. Ĉie en la plej neatenditaj lokoj tiu Nivalo aperis. Ĉu vere povus esti Nivalo, kiu subite staris malantaŭ ruĝa kurteno kun franĝoj malsupre en la koro de Londono? De Nalo Nivalo oni povis atendi kion ajn.

Ĉiame tiu Nivalo!

—Daŭrigu! diris Sventon, kaj lordo Hubardo rakontis, ke kvankam li ŝlosis la pordon kaj la fenestroj estis fermitaj, la viro estis for.

—Li ne restadis en la ĉambro. Sentis min kiel idioto. Komplete. Neniam antaŭe io tia okazis al mi, diris Hubardo.

—Precize, murmuris Sventon. Estas ĝuste. Pintaj ŝuoj kaj tute malaperinta. Konas tion. Sen postsignoj malaperinta. Ĉiame tiu Nivalo!

Sventon sidis tie konfuze simila al akcipitro. Estis konate, ke la sola, kiu iam sukcesis kapti Nivalon, estis T. Sventon.

—Se mi nur povus kompreni, kion li volas. Li nur kaŝiras tie en tre incita maniero. Kaj tial mi demandas, ĉu sinjoro Sventon volas preni sur sin la aferon. Unue mi intencis turni min al Scotland Yard.

—Scotland Yard? Je-es, povas esti. Bravaj knaboj multaj el ili. Sed mi esploros, kion mi povos fari. Diru al mi nur unu aferon. Ĉu troviĝas fattobulkoj en Londono?

Ĉiu homo havas sian etan strangaĵon, kaj la stranga ĉe Sventon estis, ke li diris fattobulkoj, kiam li volis diri fastobulkoj, kaj ke li diris pitolo, kiam li diru pistolo.

—Fattobulkoj? diris lordo Hubardo. Li cerbumis kviete kaj zorgeme. Fattobulkoj? Ne, li diris, mi neniam renkontis fattobulkon en Londono.

—Povas kredi tion! diris Sventon. Ha! Ridinde! Neniu fattobulkoj en Londono, unu el la plej grandaj kaj riĉaj urboj en la mondo. Li ekmemoris, ke ekzistas tutaj kontinentoj, kie regas la sama terura manko de fattobulkoj.

Fraŭlino Jansono malfermis la pordon kaj enmetis la kapon:

—Sinjoro Omaro atendas, ŝi diris.

Forvojaĝo al Londono

Kiu? demandis Sventon. Ĉu sinjoro Omaro?

—Jes, sinjoro Omaro el Araba Dezerto.

Sventon cerbumis sagace.

—Kie li atendas?

—En la atendejo.

Privatdetektivo estas kutimita al strangaj kaj malfacile klarigeblaj cirkonstancoj. Sventon tuj komprenis, ke se lia amiko Omaro sidas en la atendejo, tio devas esti, ĉar li pro iu kaŭzo vojaĝis ĉi tien el la dezerto.

Tuj sinjoro Omaro aperis je la pordo. Li estis alta kaj svelta, kaj vere orienta li aspektis. Liaj okuloj estis nigraj kaj nepenetreblaj kiel araba nokto. Li estis vestita per ĉiutaga kostumo de okcidenta modelo, sed sur la piedoj li havis paron da molaj pantoflosimilaj ŝuoj, kiuj estis pintaj kaj suprenfleksitaj.

—Estas por mi granda honoro, ke mi persone rajtas saluti sinjoron Sventon, li diris kaj riverencis unue antaŭ Sventon kaj poste antaŭ lordo Hubardo kaj fine antaŭ ambaŭ samtempe.

—Agrabla surprizo, diris Sventon. Ĉu mi rajtas regali vin per fattobulko?

—Post miaj antaŭaj vizitoj ĉe sinjoro Sventon mi tenas tiujn fastobulkojn en dankema memoro, kaj estos por mi gran-

da plezuro persone konsumi tian en kunesto de sinjoro Sventon.

—Fraŭlino Jantono, vokis Sventon. Bonvolu telefoni al Roto pri dek kvar plenigitaj.

Sukeraĵejo Rozo estis la nura loko en la tuta Stokholmo, kie oni dum la tuta jaro povas aĉeti fastobulkojn. Sventon tre ŝatis fastobulkojn. Siajn plej tranĉilakrajn planojn li elcerbumis, kiam li manĝis fastobulkojn. Sed ili devis esti plenigitaj, tre plenigitaj.

La fastobulkoj de Rozo baldaŭ venis, kaj ili estis bonegaj – konvene brunaj kaj kun multe da kremo, kiu superŝvelis en ĉiuj direktoj. Fraŭlino Jansono surtabligis kafon en sia ĉambro, kaj Sventon, lordo Hubardo, fraŭlino Jansono kaj sinjoro Omaro sidiĝis ĉirkaŭ la tablo.

—Mia modesta vizito kaŭziĝas de bagatela malsaneto en la bronkoj, diris Omaro kun tuseteto. Mi havas la honoron esti survoje al Londono por provi kuraci miajn bronkojn.

—Sed tie ja estas kruda kaj malseka klimato dum la nuna sezono, fraŭlino Janson diris maltrankvile.

—Jes, konsentis sinjoro Omaro, kaj riverencis ĝentile. Mi provos kuraci miajn bronkojn en la nebula kaj malseka klimato. Liaj okuloj estis nepenetreblaj kiel araba nokto.

—Tiamaniere, diris T. Sventon. Privatdetektivo kutimiĝas al la plej strangaj cirkonstancoj, kaj Sventon estiĝis neniel surprizita.

—La varmega dezerta vento kune kun ĉirkaŭŝvebantaj sableroj en la aero sekigis miajn bronkojn, klarigis Omaro.

—Malagrabla aŭdi, diris lordo Hubardo.

—Tre malagrabla, diris Sventon.

—Mia kuracisto doktoro Huseno ĉe Okcidenta Bazarstrato

konsilis al mi serĉi malsekan kaj prefere nebulan klimaton. Mi bezonas malsekon en la bronkoj, li diris. Li proponis Londonon en novembro.

—Ĝi estas la ĝusta loko, lordo Hubardo diris. Tie estas nebulo. Kaj kiam lordo Hubardo parolis pri nebulo, li celis nebulon.

—Estos por mi granda honoro persone resti dum kelke da tempo en tiu fama nebulo, diris sinjoro Omaro kaj riverencis respektplene. Mi do estas en Stokholmo pro malgrava traveturo. Jam hodiaŭ vespere mi plueniros al Londono.

—Tiaokaze, diris T. Sventon kaj forbrozis eretojn da pano de la maniko, eble ni kuniros. Mi prenos la tapiŝon.

—Ĉar mia propra fluganta tapiŝo por la momento estas ĉe la artflikisto, estus tre valore por mi povi kunveturi sur la tapiŝo de sinjoro Sventon.

Sventon demandis, ĉu lordo Hubardo volus akompani ilin sur la tapiŝo.

—Volonte prenos la tapiŝon, se estos loko. Plezure provi.

Sventon rapide pretigis sin. Li metis dek bone bakitajn fastobulkojn en ujon, kiun li kutimis kunhavi dum siaj vojaĝoj (la fattobulkujo). Plue li kunprenis primuson, kafokaserolon kaj sakon kun siaj diversaj vestoj kaj kelkajn falsajn barbojn. Ĉion li metis sur la tapiŝon. Li pendigis sian bonan kampolornon per rimeno ĉirkaŭ la kolon kaj metis sian oficistpistolon (kavaleria pistolo el la tridekjara milito) en la poŝon. Fine li surmetis nigran lansubŝtofitan plenbarbon.

Dum tiu tempo lordo Hubardo kaj sinjoro Omaro rigardis la tapiŝon. Ĝi estis mezgranda, iom uzita orienta tapiŝo, kiu disigis specialan odoron.

—Kion ĝi odoras? lordo Hubardo demandis kaj entiris la odoron tra la nazo.

—Kamelon, diris Omaro per sufokita voĉo, kamelon. Li vidis antaŭ si senfinan sablomaron, kie vico da kameloj marŝadis en sia serioza maniero, li vidis palmkronojn en oazo kaj tendon sub la palmoj, kie oni trinkis araban kafon el arabaj tasoj. Sinjoro Omaro aspektis preskaŭ melankolia. Ĝi odoras kamelon, li ankoraŭfoje diris kun kvieta riverenco kaj malrapide entiris la odoron tra la nazo.

Sventon malfermis la fenestron je la plena largho. La nebulmalvarma frosta novembra aero penetris en la ĉambron kun la stratobruo. Privatdetektivo Ture Sventon, sinjoro Omaro kaj lordo Hubardo sidiĝis sur la tapiŝon.

—Adiaŭ, fraŭlino Jantono. Bonvolu fermi la fenestron post ni, diris Sventon. Fine li karesis per la mano la franĝon de la tapiŝo kaj diris:

—Holanda Parkavenuo, numero 104, Londono, Britio.

Kiel levita de nevideblaj manoj la tapiŝo supreniĝis kaj elflugis tra la fenestro. Baldaŭ ĝi estis videbla nur kiel malgranda punkto super la tegmentoj. Baldaŭ ĝi malaperis.

Fraŭlino Jansono fermis la fenestron post ili kaj komencis kroĉtriki pottuketojn.

Alveno al Londono

La angla londononebulo estas tre mondfama. Londononebuloj en aliaj landoj preskaŭ ĉiam havas mankojn: aŭ ili estas tro maldensaj kaj akvecaj, aŭ ili aperas nur ĉirkaŭ altaj montopintoj, kiuj estas malfacile atingeblaj, aŭ sur marĉaj herbejoj, kie neniu havas efektivan ĝojon de ili. La angla londononebulo malleviĝas komforte super la meza urbo, tiel ke oni havas ĝin sub la manoj. Plue ĝi estas bonkvalita kaj rezistas ĉiun streĉon. Neniu alia urbo povas produkti tian unuaklasan londononebulon kiel Londono.

La tapiŝo frue en la mateniĝo transpasis la Nordan Maron, ĝi preterpasis la grandajn fiŝbenkojn, ĝi nun proksimiĝis al la mondurbo ĉe la rivero Tamizo kaj englitis en la nebulon. La tri pasaĝeroj tuj fariĝis reciproke nevideblaj. Ili ne povis eĉ momente ekvidi unu la alian. Ili sidis kiel en lakto. Sub si ili aŭdis disajn sonojn el la stratoj de la mondurbo, kiu vekigis al vivo. Krom tio aŭdiĝis nur la susura sono, kiu ĉiam estas aŭdata sur fluganta tapiŝo.

Privatdetektivo Sventon turnis sin, sed vidis nur lakton.

—Hola! li vokis. Ĉio en ordo tie, ĉu?

—Jes, ĉio bone! aŭdiĝis voĉo malantaŭ li en la lakto. Estis lordo Hubardo.

—Mi jam havas la nemerititan plezuron senti iom da mildigo en la bronkoj, aŭdiĝis la voĉo de Omaro. Kaj la du aliaj

aŭdis, kiel li tiris ekstre longajn enspirojn por pli bone utili-
gi la klimaton.

Subite sonis la bruo de turhorloĝo tute apud ili. La sono estis tiel surdiga, kaj ĝi venis tiel neatendite, ke ili preskaŭ falis de la tapiŝo. Ni devas esti pasintaj proksime al preĝejo turo, murmuris Sventon. Privatdetektivo, kiu estas je danĝera esplorkomisiono, bezonas sian tutan koncentriĝpovon. Nun li preskaŭ estis falinta de la tapiŝo kun fenditaj timpanmembranoj. Ili kutime enmetas tro fortaj sonmekanismojn en la turojn, li murmuris.

—Taso da varma teo gustos bone, kiam ni atingos la celon, diris lordo Hubardo kaj bruligis sian pipon.

Ili travivis relative malvarman nokton super la Norda Maro. Sventon kuiris kafon sur la primuso, kaj ili estis manĝintaj (plenigitaj) fastobulkon. Ili vidis la lanternojn de centoj da fiŝboatoj ĉe Dogera Benko, ili vidis du-tri preterglitantajn homplenajn pasaĝerŝipojn, festene lumigitajn en la nokto. Nun ili ĝojis, ke ili baldaŭ estos ĉe la celo. Ie en ĉi tiu lakto-
maro situis Holanda Parkavenuo 104. Kiam ajn la tapiŝo povus malleviĝi kaj surteriĝi. Ili aŭdis la bruon de pluraj turhorloĝoj, sed feliĉe el pli granda distanco, kaj ili aŭdis disajn sonojn de busoj kaj aŭtoj.

Ĉiu, kiu iam veturis en densa nebulo sur fluganta tapiŝo, scias, kiom oni surpriziĝas, kiam oni subite sentas malfortan puŝon kaj troviĝas sur la tero. En la densa laktomaro oni ne rimarkis, ke la tapiŝo malleviĝis – nun oni subite sidas sur la tero kaj la susura sono ĉesis. Ekzistas pasaĝeroj, kiuj je tiaj okazoj eĉ aspektas stultaj.

—Kio okazis? la lordo gruntis.

—Laŭ mia modesta opinio la tapiŝo ĉesis flugi, Omaro di-

ris kaj metis la manon sur la grundon apud si. Estis sablo. Oni sidis sur sablovojeta.

Sventon estis la unua, kiu ekregis sin kaj stariĝis. Lia nigra plenbarbo aperis proksime al la aliaj. Li estis tute erarige simila al akcipitro (se oni povas imagi al si akcipitron, kiu aperas kun nigra plenbarbo en la londona nebulo).

—Ĉu ĉi tio estas Holanda Parkavenuo 104 en Londono? li akre demandis.

—Atendu momenton, kaj ni rigardos, ĉu ni estas hejme, diris lordo Hubardo. Li leviĝis de la tapiŝo kaj komencis etan matenan gimnastikon. Sentiĝis agrable iom moviĝi. Malvarma mateno.

—Ne estas tempo por perdi. Devas tuj komenci la esplorlaboron! malpacience aŭdiĝis de Sventon.

—Tute ĝuste. Temas pri rapido ĉi tie, diris Hubardo, kiu ĝuste trunkruliĝis.

—Ĉu tio estas Holanda Parkavenuo 104, Londono, Britio? Sventon ripetis.

Ĝuste en tiu momento malforta matena brizo ekblovis tra la urbo. La laktomaro tiam malordiĝis, ĝi estiĝis pli maldika kelkloke, kaj la tri viroj sur la sablovojeta kaptis ekvidon de domo, ili vidis kelkajn altajn, mallarĝajn fenestrojn kaj pordegon kun du blankaj kolonoj antaŭe.

Ĉu tio estis la loĝejo de lordo Hubardo? Ĉu la tapiŝo trovis la ĝustan vojon en la nebulo? La du aliaj rigardis lin demande, kaj Sventon parolis per voĉo, kiu povus trapenetri la plej densan nebulon.

—Ĉu ni nun estas ĉe la celo? Ĉu vi loĝas ĉi tie?

—Kompreneble, diris lordo Hubardo kaj aspektis mirigita. Mia avo aĉetis la domon en sia tempo. Mi ĉiam loĝis ĉi tie.

(Vere strangaj homoj tiuj privatdetektivoj, li pensis. Kial li kredas, ke mi estus transloĝinta? Ĉu mi diris vorton pri tia afero?)

Lordo Hubardo malfermis la pordon per sia ŝlosilo kaj paŝis flanken. Privatdetektivo T. Sventon el Stokholmo prenis la fattobulkujon, tapiŝon, primuson, kamplornon kaj kafokasaron kaj iris en la domon. Sinjoro Omaro riverencis respektplene en la nebulo kaj ankaŭ eniris. Lordo Hubardo fermis la pordon malantaŭ ili.

Kiu estas fraŭlino Poli?

La manĝoĉambro en la domo Holanda Parkavenuo 104, Londono, estis meblita per pezaj kaj malgajaj mebloj. Ankaŭ la mateno estis tre malgaja, sed fajro en la kameno donis iom da hejmeco en la ĉambro.

Ĉirkaŭ la tablo, kiu estis farita por familio de tridek personoj kun familiaraj geamikoj, sidis lordo Hubardo, privatdetektivo T. Sventon, Stokholmo, sinjoro Omaro el Araba Dezerto kaj la junaj parencoj de la lordo, la knabino Maria kaj la knabo Diko.

Lordo Hubardo manĝis ŝinkon kaj ovojn. Ŝajnis, ke li estus preta nomi gajulo ĉiun, kiu opinius, ke estas strange, ke praktikanta privatdetektivo sidas ĉe la tablo. Li prenis ankoraŭ unu porcion da ŝinko kaj ovo, kaj koncerne kaŝirajn paŝojn oni volus kredi, ke li heredis ilin kune kun la domo (Holanda Parkavenuo 104, Londono).

Sinjoro Omaro, Arabio, trinkis teon. Neniu povus antaŭsenti, ke li cerbumis, kial teo estas trinkata, kiam ekzistas kafo. Neniu povis nei, ke ekzistas kafo. Liaj malhelaj okuloj estis nepenetreblaj kiel araba nokto.

Ankaŭ Maria Hubardo trinkis teon. Ŝi havis kvadratitan robon kaj helajn harojn. La nura strangaĵo pri ŝi estis, ke sur ŝia rostita pantranĉaĵo, kiun ŝi tenis per la dekstra mano, estas tiom da spaco por oranĝomarmelado. Koncerne ŝian fraton Dikon la marmelado ne trovis lokon sur lia panrostaĵo. Neniu rostita pantranĉaĵo en la mondo povus havi lokon por

tiom da marmelado. Ankaŭ neniuj nerostita. Tial ĝi gutis sur liajn fingrojn kaj sur la pantalonon.

T. Sventon, kiu metis la nigran plenbarbon apud sia telefono, sidis profundiĝinta en pensoj. Li apogis la kubuton al la tablo kaj la kapon en la mano. Li ne dubis pri tio, ke la kaŝiranta viro estas Nalo Nivalo. Kredeble li kunlaboris kun aliaj krimuloj, eble kun tuta – aŭ pli feliĉe duona – krimulbando. Nalo nome estis konata pro tio, ke li neniam sola faris krimon. Nun Sventon cerbumis pri

1) kion N. Nivalo celis per la kaŝirado en la domo Holanda Parkavenue 104, Londono, kaj

2) kiel oni praktikas esploradon en nebulo.

Sventon kompreneble de tempo al tempo restadis en nebulo, sed ĝi ĉiam disiĝis antaŭ la tagmezo, kiam la laboro de privatdetektivo komenciĝas.

—Aŭskultu nun, diris Sventon kaj frapis per forko kontraŭ polurita tablotabulo. Mi tuj komencos la esploran laboron. Petu la servistaron enveni.

—Jes, diris Hubardo, sed ĉefserviston mi ne havas. Ne eblas trovi tian nuntempe. Estas same ĉie.

—Mi vokos ilin, diris Maria. Ŝi ŝovis la restaĵojn de sia oranĝomarmelada buterpano en al buŝon kaj elkuris. La aliaj atendis, sed fariĝis silento en la domo dum momento depende de tio, ke Maria staris malantaŭ la pordo kaj glutis marmeladon, antaŭ ol ŝi vokis:

—Beti kaj Joana!

Poste ĉiuj ree atendis dum momento. Ĉiuj scivolis aŭdi, kiel la fremda privatdetektivo komencos la esplorlaboron – ĉiuj krom Sventon, kiu sciis tion, kaj lordo Hubardo, kiu enverŝis ankoraŭ tason da teo, kaj sinjoro Omaro, kiu kun orienta

egalanimeco miriĝis, ke la tegrandkomercistoj povis gajni vivrimedojn, kiam fakte trovigas kafgrandkomercistoj (multaj el ili eble ankaŭ havis grandajn familiojn). La nuraj, kiuj estis scivolaj, estis Diko kaj Maria. Ili ne povis ne rigardi Sventon.

Fine venis Joana, kiu estis granda kaj dika kaj portis grandegan blankan antaŭtukon, kaj Beti, kiu estis malgranda kaj pala kaj permane tenis la buŝpecon de la polvosuĉilo. Sventon metis sian notlibron antaŭ si sur la tablon. Li unue turnis sin al la kuiristino.

—Rakontu, kion vi scias, li diris. Ĉu vi aŭdis aŭ vidis ion neordinaran ĉi tie?

—Jes, tion mi vere faris, diris Joana kaj aspektis ĝuste tia, kia ŝi kutimas, kiam ŝi avizas sian ekŝigon. Ofte.

—Estas certe iu natura kialo, lordo Hubardo trankvilige murmuris. Bonegaj ovoj ĉi tiuj. Vere bele demetitaj.

Parolante pri ovoj Joana kritike rigardis la teleron de Sventon. Li forgesis manĝi sian frititan ovon. Ĝi kuŝis malvarma kaj ŝrumpinta sur la telero.

—Ĉu estas iu difekto je tiu ĉi ovo? ŝi demandis.

Sventon rigardis la ovon kaj cerbumis sagace.

—Estas ankoraŭ tro frue diri ion pri la afero, li deklaris.

—Ĉu iu fremda ovo estis videbla en la domo, kiam mi estis for? Hubardo demandis por kunhelpi en la esplora laboro. Iu fremda persono, mi volas diri. Persono. Ne ovo. Persono.

—Vidis iun, ne, danke al Dio, sed mi aŭdis ion.

Sventon tiris al si la notlibron, lordo Hubardo murmuris ion pri "natura kialo". Omaro aspektis pli nepenetrebla ol la nokto. Diko kaj Maria interŝanĝis rigardon. Ili ŝatis detektojn.

—Mi aŭdis la ŝtuparon al la subtegmentejo knari lastnokte, diris Joana.

—Tion ankaŭ mi aŭdis, ekkriis Beti. Sed mi ŝlosis la pordon. Mi ne kuraĝis elrigardi en la subtegmentejon.

—Kaj mi aŭdis Fraŭlinon Poli sibli, diris Joana.

—Kiu?

—Mi.

—Kiu sibilis?

—Fraŭlino Poli, kompreneble. Mi ne sibilis.

—Kiu estas Fraŭlino Poli? Sventon demandis kun firma voĉo.

—Kaj kiam mi venis en la banĉambron antaŭ kelkaj tagoj, staris tie fremda viro, Beti interrompis kun malfermegitaj okuloj.

—Estas certe iu natura kialo, murmuris lordo Hubardo.

—Li diris, ke nun ĝi estas pretigita, kaj foriris, sed mi aŭdis, ke Fraŭlino Poli sibilis.

Ree tiu Fraŭlino Poli! Sed antaŭ ol Sventon sukcesis diri pluan demandon, Joana diris:

—Kaj kiam mi volis telefoni al la buĉisto, staris fremda viro ĉe la telefono kaj diris, ke ĝi nun estas preta, kaj poste li foriris. Mi aŭdis, ke Fraŭlino Poli sibilis, antaŭ ol li malaperis.

—Aŭskultu nun! diris privatdetektivo Sventon kaj frapetis la tablon, tiel ke kelkaj blankaj flokoj turniĝfalis de la plafo. Fraŭlino Poli! Kiu estas Fraŭlino Poli?

Antaŭ ol iu povis respondi, aŭdiĝis kaŝiraj paŝoj de la pordo. Ĉiuj turnis sin tien.

Blanka angurokato staris en la pordotruo kaj rigardis ilin per malvarmaj, flavverdaj okuloj.

Sventon fariĝas lordo Hubardo

Profunda silento regis en la hubarda manĝoĉambro. Fine Maria trilis.

—Fraŭlino! Venu Fraŭlino! Ŝi klaketis per la fingroj por allogi la katon, sed pro la oranĝomarmelado audiĝis neniu klaketo. La kato restis senmova en la pordotruo, nur la vosto moviĝis.

—Ne afektiĝu nun, Fraŭlino Poli! kriis Diko kaj klaketis per la fingroj, sed tio eĉ malpli audiĝis. Fraŭlino Poli faris okojn per la vosto kaj observis ilin per siaj flavverdaj okuloj.

—Ĉu Fraŭlino Poli ricevis sian matenmanĝon? demandis lordo Hubardo kaj rigardis Joanan. Kiam li pretrigardis, li rapide diris: Nenia urĝo. Duonan haringon je okazo. Iom pli malfrue eble.

—Ĉu mi iam forgesis la haringoduonon al la kato? demandis Joana kaj apogis sin al la muro.

—Ne, ne, ne. Belega ŝinko ĉi tiu, cetere. Ankaŭ vere delikataj ovoĵoj.

Privatdetektivo T. Sventon opiniis, ke estas tro multe parolate pri katoj, haringduonoj kaj ovoĵoj. Li frapis per la plumo al la tablo.

—Ni daŭrigas, li diris. Ĉu estas iu, kiu povas doni ankoraŭ pli da informoj?

Neniu havis pli da scigoj pri la mistika viro, kvankam Joana

murmuris ion pri tio, ke sufiĉas la jam dirita, kaj Diko murmuris ion pri pistolo, kiun li ne rajtas pruntepreni.

—Tiuokaze, diris Sventon kaj elprenis la fattobulkujon, kiun li estis metinta sub la seĝon, mi petas vin rigardi tiun bulkon.

Joana proksimiĝis kaj rigardis en la ujon. Ŝi vidis grandan bele bakitan tritikbulkon. La supra parto estis detranĉita kiel kovrilo, kaj sub la kovrilo elŝvelis la batita kremo en ĉiuj direktoj. Sventon singarde levis la fastobulkokovrilon kaj montaris al ŝi, ke sub ĝi estas kaŝita migdalaĵo. Li petis ŝin baki kelkajn tiajn bulkojn en ĉiu tago, dum kiu li restos en la domo.

Lordo Hubardo kraĉotusis kaj deklaris, ke ekzistas bonega bakejo-butiko en la najbareco. Precipe iliaj ĉokoladumitaj keksoj... Sventon diris, ke li ĉiam alte taksas la londonajn bakistojn. Ilia nura manko estis ilia partieceo. Sventon ne kulpis, ke ili tute neas baki fastobulkojn. Li premis la fastobulkon en la manon de Joana, por ke ŝi havu modelon por imiti. Poste li rapide manĝis sian frititan ovon kaj diris, ke li intencas tuj daŭrigi la esploran laboron. Ĉiuj leviĝis de la tablo.

Lordo Hubardo petis, ke Sventon kaj Omaro sekvu lin al la supra etaĝo, por ke li montru al ili iliajn ĉambrojn. Lordo Hubardo, Sventon, Omaro, Maria, Diko kaj Fraŭlino Poli ansero-vice supreniris la ŝtuparon. Omaro diris, ke tio estas por li granda honoro. La lordo asertis, ke la ĉokoladumitaj keksoj honeste dirite estas bongustaj. Fraŭlino Poli stariĝis je la postkruroj kaj lekis la fingropintojn de Maria kaj poste tiujn de Diko.

Sventon kaj Omaro ricevis ĉiu sian malvarman kaj malsekan ĉambron kun kurteno de malseka nebulo ekster la duone fermitaj fenestroj. Omaro riverencis respektplene kaj di-

ris, ke la ĉambro estos netakseble utila al liaj bronkoj, en kiuj li jam havis la plezuron senti mildigon.

—Ni tuj komencas, diris Sventon kaj pli similis al akcipitro ol iam. La nura maniero aranĝi efikan gardon de la domo estas ŝanĝi vestojn. Bonvolu demeti tiun kvadratitan kostumon! Ekde nun mi estos lordo Hubardo.

Lordo Hubardo cerbumis pri tio.

—Mi komprenas, li diris. Sed kio do mi estas...?

—Estas tro frue paroli pri tiu afero, Sventon diris per firma voĉo. Bonvolu depreni la kvadratitan!

Lordo Hubardo eniris en sian ĉambron. Post momento li venis al la ĉambro de Sventon vestita per noktosurtuto kaj kun la kostumo sur la brako.

—Ekde nun mi estas lordo Hubardo, diris Sventon kaj iris en la banĉambron, kie li ŝanĝis vestojn. Poste li zorgeme el la vestosako elektis lipharojn, pendantan, ruĝbrunan aĵon. Plue li aliigis la tutan vizaĝon tiel, ke neniu povis distingi lin de lordo Hubardo. Al sperta privatdetektivo tio estas momenta ludago. Li ŝovis la kavaleripistolon en la poŝon kaj bruligis sian pipon.

Diko kaj Maria surprizitaj silente fiksrigardis lin, kiam li envenis. Ili preskaŭ timiĝis. Fraŭlino Poli flaresploris lian pantalonon kaj siblis. Sinjoro Omaro riverencis kun orienta trankvilo.

Tiam la pordo malfermiĝis kaj lordo Hubardo envenis. En kvadratita kostumo. En egala kostumo, kostumo el sama ŝtofo kaj sama modelo. Ekzakte egala. Nun neniu povus distingi ilin unu de la alia.

Ambaŭ staris silentaj kaj rigardis sin reciproke. La lordo sentis iom da malagrablo kaj fermis la okulojn. Dum momen-

to li ne sciis, ĉu li estas lordo Hubardo aŭ privatdetektivo Sventon. Aŭ ĉu male Sventon estas privatlordo Hubardo kaj inverse. Li sentis facilan kapturton kaj provis esplori, kiel la aferoj statas. Li levis la manon al la frunto kaj feliĉe rimarkis cikatron sur la dikfingro, kiun li ricevis, kiam li kiel infano vundis sin per tranĉilo. Kaj tial li certe sciis, ke Sventon ne estas Hubardo kaj male.

—Por kio tio utilis? demandis Sventon.

—Uzas ĉiam la saman specon de kostumo, diris lordo Hubardo. Havas nur tiun ĉi specon labortage. Ĉiam havis.

Sventon ŝmacis malpacience per la lango. Nu, nur restu en via ĉambro. Ne lasu iun vidi nin kune. Li turnis sin al sinjoro Omaro. Ĉu sinjoro Omaro volas servi kiel ĉefservisto? Estus bezonate por la gardado.

Sinjoro Omaro serveme riverencis.

—Tio estus vere bonege! ekkriis lordo Hubardo. Praktike neeble trovi bonan ĉefserviston nuntempe. Mi provis...

—Mi scias, interrompis Sventon.

—Estas por mi neatendita honoro servi kiel provizora ĉefservisto en ĉi tiu domo, diris Omaro kaj riverencis respektoplene. Liaj okuloj estis same nepenetreblaj kiel iam. Mi laŭ modesta kapablo provos respondi al tiu konfido, kiu tiel bonvole montriĝas al mi.

Lordo Hubardo elprenis blankan amelitan kolumon kaj pompan nigran antaŭtagmezan kostumon. Kiam Omaro estis surmetinta tiujn vestojn, neniu povis distingi lin de orientlanda ĉefservisto.

—Vidu! diris Sventon kaj eltiris rezervpistolon el la poŝo. Prenu ĉi tiun pitolon.

—Mi havas mian en la noktotabla kesto, diris lordo Hubardo.

—Estas bone. Sed memoru. Uzu la pittolojn nur se necese. Memoru tion, knaboj – nur se necese! Li turnis sin al Maria kaj Diko. Kaj vi, miaj junaj geamikoj – memoru, ke kion vi ĉi tie aŭdis kaj vidis, tio estas sekreto. Nun mi estas via onklo.

Sventon solvas la misteron de Fraŭlino Poli

Lordo Hubardo iris en sian ĉambron. Sventon iris en la bibliotekon. Post kiam li esploris la kurtenojn, li sidiĝis sur seĝo. Ĉefservisto Omaro faris sin nevidebla. Neniu ĉefservisto povas fari sin pli nevidebla ol orientana ĉefservisto. Maria kuris suben en la kuirejon. Tie ŝi saltis unupiede kaj kriis: Mi scias, mi scias, mi scias! ĝis Joana elpelis ŝin. Tiam Diko enŝovis la kapon kaj kriis: Ankaŭ mi scias!

Sventon sidis profunde enpensiginta, kiam Omaro senbrue envenis kun fastobulko sur pleto.

—Estas por mi granda plezuro povi persone prezenti ĉi tiun bonbakitan saluton el la kuirejo, diris ĉefservisto Omaro.

Sventon singarde gustumis la fastobulkon. Poste li manĝis pli rapide. Ĝi estas tro malgranda, li diris. Sed estante tro malgranda, ĝi tamen estas relative konvena.

Post kelkaj minutoj, kiam Sventon ree sidis en profundaj pensoj, Omaro aperis same senbrue kiel antaŭe. Nun li portis en la mano etan arĝentan teleron, kaj sur ĝi kuŝis letero.

—Estas por mi granda honoro prezenti tiun ĉi leterpoŝtaĵon, kiun la poŝtisto ĵus havis la honoron...

—Dankon, diris Sventon kaj prenis la leteron. Ĉar ĝi estis adresita al lordo Hubardo, Sventon tuj malfermis ĝin.

Estas ege grave por praktikanta privatdetektivo identiĝi kun la rolo, kiun li ĝuste tiam ludas. Lordo Hubardo dum

momento fermis la okulojn kaj ne bone sciis, kiu li estas. T. Sventon kontraŭe nenion preterlasis. Li dum sia tuta tempo sciis, ke li estas lordo Hubardo. Sen pripensado li do malfermis la leteron kaj legis:

Mia kara nevo!

Ĉu vi kredas, ke vi povas memori, ke Fraŭlino Poli ĉiutage havu 1/2 haringon, pecon da bovidviando kaj du mezurojn da kremo? Mi nur volas memori vin. Mi fidas vin, aŭ pli bone dirite, mi ne fidas vin. Estas malgaje por mi diri, ke vi jam kiel eta knabo estis tre malordema. Sed mi atendas, ke mi je mia hejmenveno al Londono trovos Fraŭlinon Poli tute sana. Vi ĉiam postulas, ke mi interesiĝu pri viaj ekonomiaj zorgoj. Ĉu do estas tro multo petata de via onklino, ke vi pensu pri tio: 1/2 haringo, unu peco da blanka bovidviando kaj 2 mezuroj da kremo?

Salutojn de via sindona onklino

Viktoria

—Ha! ekkriis Sventon-Hubardo kolere. Malordema? Mi! Kiel knabo? Kiam mi studis en Vasa mezlernejo, mi ĉiam ricevis bonajn atestojn pri diligento kaj konduto. Ridinde!

Sventon aŭskultis. Li klare aŭdis mallaŭtan zumantan sonon en la ĉambro, sed li ne povis kompreni, de kie ĝi venas. Sonis kiel eta senbrua motoro kun konstanta agrabla moviĝo. Privatdetektivo ĉiam estas elmetita al danĝeroj de diversaj specoj, kaj se li subite aŭdas etan motoron en la ĉambro, tio estas grava kaŭzo, ke li estu singarda. Sventon prenis la kavaleriopistolon el la poŝo kaj ĉirkaŭrigardis. La ĉambro havis altajn librobretarojn, kaj meze de unu el la longaj flankoj estis

granda kameno. Estis du fenestroj, kiuj ambaŭ rigardis al la nebulo. Li rigardis en la paperkorbo kaj malantaŭ la kurtenoj. Li aŭskultis zorgeme. Sonis kvazaŭ la motoro troviĝus proksime al la kameno. Tie staris du grandaj brakseĝoj, kiuj vere ŝajnis senkulpaĵ, sed kiujn li tamen decidis pli detale esplori. En unu kuŝis ruĝa kuseno, en la alia blanka. Li kredis, ke li eraris kaj anstataŭe iris al unu el la librobretoj. Tiam li aŭdis la motoron ree starti malantaŭ si.

Ĉiu, kiu iam aŭdis nevideblan bibliotekmotoron starti dorsflanke, scias, kiom ekscita tio estas. Sventon rapide turniĝis kaj levis la ofican pistolon. Tiam la blanka kuseno leviĝis kaj eksaltis al la planko.

Sventon-Hubardo tuj komprenis, ke la motoro estis nur Fraŭlino Poli, kiu kuŝis kaj ŝpinis en la seĝo. Li provis kapti la eternan katon, sed Poli forsaltis kaj siblis. Estis neeble kapti ŝin. Ŝi faris belan angurosulton supren sur unu el la librobretoj. Tie ŝi sidis kaj rigardis Sventon-Hubardon per misteraj senmovaj flaveverdaj okuloj. Svanton sidiĝis en la seĝo.

Estas necerte, kiom longe Sventon-Hubardo sidis en la seĝo kaj pensis. Eble li sidis tie dum relative longa momento. Aliflanke tio eble okazis dum multe pli mallonga momento. Sed kiam li stariĝis, li estis solvinta la tutan misteron.

Sekretario Smito en Societo Kato

Sventon-Hubardo iris al unu el la librobretoj kaj serĉis enciklopedion. Fine li trovis konsultlibron, kiu nomiĝis "La eta brita Ĉionsciulo", vere bonega verko, kiun li malfermis kaj sur unu el la unuaj paĝoj legis:

ANGUROKATO, devenas el la turka ĉefurbo Anguro. A. estas granda varianto de katogenro, kvankam ĝi ne atingas la grandecon de la tigro aŭ pumo. La koloro plejofte estas blanka, iufoje (je marĉa vojstato) flava aŭ griza. La feloharoj atingas la respektindan longon de 1 dm.

Sventon staris kun la dorso kontraŭ la fenestroj, kiam li legis tion. Tial li ne rimarkis, ke vizaĝo aperis en la nebulo ekster unu el la fenestroj. Viro kun malgranda pinta vizaĝo ekrigardis en la hubardan bibliotekon. En la sekva momento la vizaĝo estis englutita de la nebulo.

Omaro subite estis videbla. Li stariĝis interne de la pordo kaj avizis vizitanton en tiu agrabla maniero, kiu faris la proksimorientan ĉefservistaron mondfama en ĉiu lando.

—Estas por mi granda honoro anonci, ke iu sinjoro Smito estas veninta por — eĉ se okaza — vizito.

Smito? pensis Sventon-Hubardo. Kie mi aŭdis tiun nomon? Jes, kompreneble — la kalsonoj de Smito. Parenco vizitas.

—Kara malnova amiko! Mi ĝojas vidi vin! diris Sventon-

Hubardo kaj iris al la vizitanto kun eltendita mano. Kiel iras la komerco?

La vizitanto, malgranda viro kun pinta vizaĝo, ornamita per orkadritaj okulvitroj, malantaŭ kiuj du perfidaj okuloj strabis en ĉiujn direktojn, restis konsternita kaj gardema proksime de la pordo.

—Kiom da paroj vi vendas potage, malnova ĉarlatano? daŭrigis Sventon-Hubardo kore kaj frapis lin surdorse, por ke li sentu sin kiel hejme.

La viro aspektis nepre suspektema.

—Pardonu, li diris, mia nomo estas Smito. Mi estas sekretario en SLUK.

—SLUK...? Jes, tio estas..., diris Sventon kaj karesis la ruĝ-brunajn lipharojn.

—Jes, Societo de Londonaj Unuiĝintaj Katamikoj.

Privatdetektivo devas havi rapidan percepton, kaj T. Sventon apenaŭ estis aŭdinta la vorton Katamikoj, kaj li jam estis gardema. Li sagace rigardis la viron.

—Des pli bone. Kredis, ke temas pri parenco. Malvarma vetero. Sidiĝu!

Ili ambaŭ sidiĝis. La eta fremda viro, kiu portis malhelbluan ŝeviotkostumon kun bone gladita pantalono kaj malgrandajn bele purigitajn pintajn ŝuojn, respondis nenion. Liaj okuloj strabis en ĉiujn direktojn. Li rigardis ĉion samtempe.

Nun Sventon sciis tute certe, kiun li havas antaŭ si, kvankam nenia nuanco en lia bonhumora hubardovizaĝo malkaŝis tiun danĝeran scion.

—Ĉu mi havos la nemerititan plezuron — rilate al la nuna vetero — regali vin per iu varmiga freŝigaĵo? demandis ĉefservisto Omaro ĉe la pordo.

—Ĉu tason da teo, sinjoro Smito? demandis Sventon-Hubardo gastame.

—Mi tre dankas, dankon, diris sekretario Smito kaj ternis. Li sidis plej ekstere sur la seĝorando.

—Estos por mi treege granda plezuro en ĉi tiu malvarma tago prezenti tason da bongusta, varma teo. Mi tamen permesas al mi atentigi pri tio, ke la varmigaj kvalitoj de kafo estas videble pli grandaj ol tiuj de la teo, kaj koncerne la aromon ĝi tute ne similas al tiu de la teo.

—Nur donu al ni ion varman, diris Sventon-Hubardo. Ĉefservisto Omaro diris, ke li provos respondi la konfidon, kaj poste li plurfoje riverencis kaj malaperis senbrue.

Smito suspekteme rigardis post li.

—Pardonu, sed tiu estas la plej babilema ĉefservisto, kiun mi iam vidis, li diris.

—Orientlanda knabo. Sperta ulo cetere. Fakte, diris Sventon-Hubardo.

—Jes, diris sinjoro Smito energie kaj sidiĝis pli bone sur la seĝo. Kiel mi diris, mi estas sekretario en Societo de Londonaj Unuiĝintaj Katamikoj. Nia granda ekspozicio malfermiĝos morgaŭ, kaj kompreneble Fraŭlino Poli devas kunesti ankaŭ ĉifoje. Neniu hezito! Ĉu? diris la viro kaj ternis trifoje.

Privatdetektivo Sventon estis en tiu momento vere timige simila al akcipitro, sed lia lerta maskaĵo faris, ke neniu povis ekvidi tion. La ruĝbrunaj haroj pendis paceme, kie li sidis kaj suĉis sian pipon. Li tenis unu manon en la poŝo. La vizitanto estus surprizita, se li scius, ke lordo Hubardo sidas kaj premas oficistpistolon, kaj ke li tute ne estas Hubardo.

—Fraŭlino Poli ĉiam kutimas partopreni. Mi ĝuste hodiaŭ matene diris al la estraro: Povas esti, ke fariĝos tertremo, tion

oni ne scias, sed unu aferon oni scias, knaboj: Poli venos! mi diris.

Sventon suĉis sian pipon kaj elsendis hejmeĉan fum nubon en la hubarda biblioteko.

—Sincere dirite, sinjoro Smito, mi ne posedas tiun katon, li diris.

—Tion mi scias, mi scias tion! Sinjorino Viktoria Smito posedas ĝin. Demandu nin pri kio ajn. En Societo Kato ni scias ĉion pri katoj, haha!

—Tiamaniere. Jes-ja.

—Tio estas, Smito daŭrigis ĝentile, ni konas ĉiujn superregajn katojn. La unua videbla stria kataĉo en kelomalfermejo ĉe Bakista Strato — ne, pri ĝi ni eble malmulton scias. Sed Fraŭlino Poli! Tio estas io alia!

La orientana ĉefservisto aperis senbrue el malplena nenio kun kafopleto.

—Mi havis la neatenditan favoron en la kuireja sekcio malebligis la teopreparadon, li deklaris kun interna kontenteco. Estas por mi granda plezuro povi regali vin per araba kafo el mia hejmlando. Li enverŝis du etajn tasojn da vaporanta bonodora kafo.

Lordo Hubardo-Sventon iomete levis unu el la brovoj kaj faris moveton kontraŭ la poŝo, kie li konservis la oficistan pistolon. Omaro respondis per komplete nerimarkebla araba kapklineto kaj metis orientanan montrofingron sur la pantalonpoŝon, kie la rezervpistoilo konserviĝis, poste li malaperis. Estis neniŭ dubo pri tio, ke Omaro el Araba Dezerto donis grandan senton de sekureco. Oni certe povus kredi, ke li en kriza momento aperus de malantaŭ ruĝstria kurteno en la

mezo de Londono kun rezervpisto en la mano. Silentema, fidinda kaj sekreta kiel la malhela nokto.

—Jes, diris Sventon-Hubardo, tiaokaze Fraŭlino kompreneble devas kunesti ankaŭ ĉi-jare.

—Bonege, diris la sekretario en Societo Kato kaj frotis la manojn pro raviĝo. Mi havas komfortan korbon en la vestiblo, do mi povas tuj kunpreni ŝin. Tiel vi povos eviti ĉiajn ĝenojn. Li leviĝis kaj apenaŭ povis stari senmove pro malpacienco. Li aspektis tre gaja. Kie ŝi estas? Li rigardis en ĉiujn direktojn samtempe.

—Malagrade devi diri tion, sed ŝi ne estas hejme.

La eta viro rigidiĝis. Nur liaj strabaj okuloj faris sian ordinaran laboron.

—Ŝi estas ĉe veterinaro.

—Veterinaro!

—Jes, diplomita veterinaro. Stomakospecialisto. Poli manĝis tro multe da haringoduonoj. Estas la kuiristino, kiu dorlotas ŝin. Tio ne finos bone, Joana! mi kutimas diri.

Smito staris senmova kaj cerbumis. Nur liaj strabaj okuloj laboris, faris preterhoran laboron.

—Kiam ŝi venos hejmen?

—Ŝi estas hejme. Mi volas kredi, ke ŝi ĝuste nun fritas bovostaĵon. Restu ĝis la lunĉo kaj gustumu!

—Mi celas la katon! La katon! La sekretario vere ŝajnis iom ekscitita.

—La kato? Nu, vidu nun... do vere, Fraŭlino Poli. Jes, ŝi restas ĉe la veterinaro por observado ĝis hodiaŭ vespere. Vi scias, kiel estas — stomakopumpado kaj unu afero post la alia. Ĉio postulas multe da tempo. Estis mem pumpita en la pasinta jaro.

—Mi venos preni ŝin morgaŭ. Morgaŭ je ĉi tiu horo. Poste estos tro malfrue.

—Estus tre afable, se sinjoro Smito volus fari tion. Mi dankas pro la afableco. Do, bonan matenon! Malvarman veteron ni havas.

La sekretario foriris sen diri ion pri la vetero. Ĉe la pordo staris ĉefservisto Omaro kun lia supervesto kaj ĉapelo.

—Estas por mi granda honoro persone helpi al sinjoro Smito surmeti ĉi tiun bone tajloritan palton, li diris.

—Fermu la buŝon! sibilis la malgranda kolera sekretario. Poste li suspekteme flustris: Diru al mi, kie vere estas Fraŭlino Poli?

Sventon gardeme aŭskultis malantaŭ la pordo. Li estis maltrankvila, ĉu Omaro malkaŝos, ke la kato estas en la domo. Estis grave ne fari Smiton suspektema. Kaj li eĉ pli maltrankviliĝis pensante, ke la kato povus enveni la vestiblon. Ĉiu, kiu havas angurokaton scias, kiel facile ĝi povas kaŝeniri en la vestiblon.

—Ĉu Fraŭlino Poli estas hejme? sibilis sekretario Smito.

—Estas por mi granda malĝojo bezoni diri, ke Fraŭlino pro okaza stomakomalsano devis serĉi diplomitan veterinaran kuracadon, diris Omaro kun neŝanceblebla trankvilo.

Kun unu el la respektoplenaj riverencoj, kiuj faris la orientlandan ĉefserviston mondfama en ĉiuj landoj, li transdonis al Sinjoro Smito lian ĉapelon kaj komfortan katkorbon kaj poste malfermis la pordon al la nebulo.

Sinjoro Smito el Societo Kato foriris en la saman nebulon.

La nebulo malfaciligas la esploradon

Tuj kiam la pordo estis klakfermita malantaŭ Smito, fenestropurigisto kuregis en la halon. Estis privatdetektivo T. Sventon, kiu en nekredeble mallonga tempo maskis sin.

—Rapide, sinjoro Omaro, li vokis. Ni devas sekrete sekvi lin!

—Tio estos por mi granda honoro, diris Omaro sen ŝanĝi mienon.

Sventon donis al li grizan plenbarbon de praktika sport-modelo, kiun Omaro surmetis kun orientana lerteco, post kio ili ambaŭ kuregis tra la pordo kaj daŭrigis sur la straton. Ili troviĝis en nebulo de nesuperita kvalito. Ili eĉ ne povis vidi sin reciproke. Ili staris senmovaj kaj aŭskultis. Dekstre aŭdiĝis rapidaj piedpaŝoj, kiuj malproksimiĝis.

—En tiun direkton! ekkriis Sventon kaj premis la kavaleripistolon en la poŝo. Ambaŭ kuregis dekstren kaj tuj puŝis la kapon kontraŭ parkita ŝarĝaŭto, kiu apartenis al torfsternaĵ-fabriko.

Ambaŭ daŭrigis iom kaj poste ili haltis kaj aŭskultis. Nun nenio estis aŭdata krom la muĝo de la mondurbego kaj la sono de preĝejaj sonoriloj, miksitaj kun la bruo de preterpasanta aŭtobuso. Cetere ĉio estis tiel silenta, ke oni povus kredi, ke la tuta urbo estas senhoma.

—Ha, eksonis Sventon. Nenia ideo daŭrigi sur ĉi tiu strato, kio nun estas ĝia nomo.

—Eta Strato, diris voĉo, kiu iris apud li. Sventon ekhaltis. Ne estis la voĉo de Omaro. Li malklare ekvidis staturon ĉe sia flanko.

—Pardonu sinjoro, mi kvazaŭ aŭdis, ke vi demandas pri la nomo de la strato, la fremda voĉo afable diris.

—Ha! diris Sventon kaj reiris hejmen.

Omaro jam estis hejme. Li demetis la grizan plenbarbon kaj elparolis sian varman dankemon pro la prunto. Sventon rapide transformis sin de fenestropurigisto al lordo Hubardo.

Post kelkaj minutoj ĉiuj sidis kune en la biblioteko: privat-detektivo Sventon-Hubardo, sinjoro Omaro, lordo Hubardo kaj la du junaj parencoj Maria kaj Diko. Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ la angurokato de maljuna sinjorino Smito, Fraŭlino Poli. Oni trinkis teon, kaj la fajro brulis hejmece. Ĉiu ajn povus kredi, ke ili estas feliĉa londona familio, kiu ĉe taso da varma, bongusta teo sidas babilante pri la fiaj prezoj de karbo kaj bovrostaĵo kaj pri la aĉegaj lernejaj atestoj al la infanoj. Kiu ajn tiaokaze eraras. Oni parolis pri Nalo Smito-Nivalo.

—Ne daŭris longe, diris Sventon, ĝis mi komprenis la kunligon. Nivalo volas ŝteli la angurokaton. Nivalo scias, ke la maljuna sinjorino Smito estas varme korligita al la kato. Ĉantaĝo! minace diris Sventon kaj bruligis grandan cigaron. Li volas ŝteli la katon kaj poste postuli enorman elaĉetan monsumon.

—Ĉu vere, ĉu estas tiel, diris lordo Hubardo kaj bruligis sian pipon. Mi multe miris pri tio, kial li kaŝe ĉirkaŭiras ĉi tie. Kredis unue, ke estas ulo, kiu emus aĉeti la domon.

—Li kaŝiris ĉi tie por ŝteli la katon. Ni memoras, ke Poli siblis ĉiufoje, kiam li aperis. Ŝi estas malfacile kaptebla de fremdulo. Hodiaŭ li provis alian metodon: li prezentis sin kiel se-

kretario de katasocio, kiu ne ekzistas, kaj volis kun granda afableco kunpreni la katon al ekspozicio, kiu ankaŭ ne ekzistas.

—Ĉu tiel, diris lordo Hubardo kaj elsendis kvietan fumnuĉon. Sed per tio ni ne lasos nin trompi. Iom pli da teo?

—Li revenos morgaŭ. Tiam mi lasos lin kunpreni la katon.

Ĉiuj rigardis konsternitaj T. Sventon. Iomete da marmelado falis sur la pantalonon de Diko. Fraŭlino Polio movis la voston en okoj. Lordo Hubardo cerbumis kun maltrankvila mieno.

—Supozas, ke devas esti iu eraro, li diris. Volas prefere restigi la katon. Alie mia onklo volus... mi estas tre dependa de... mi celas...

—Li kunprenos la katon, diris Sventon per firma voĉo. Li kredeble kunlaboras kun tuta aŭ almenaŭ duona krimulbando, kiu devos esti malkovrita. Se persono ne unue ŝtelos la katon, estos poste neeble malkovri lin.

—Ĉu vere, jes tiaokaze... ne bone scias ion pri tiaj aferoj, Hubardo diris kun zorgema mieno.

—Bona onklo Sventon, ĉu ni rajtos ĉeesti, kiam Nivalo venos? vokis Maria.

—Jes, tion ni rajtos, ĉu ne? demandis Diko kun io malklara en la voĉo.

—Diko, mia knabo, diris lordo Hubardo, vi devas finmaĉi antaŭ ol li venos, antaŭ ol vi parolu, mi volas diri. Maria ĉiam finmaĉas.

—Ŝi tute ne havas tiom da marmelado sur sia buterpano, klarigis Diko.

—Ankaŭ ne sur la pantalono, diris Maria.

—Miaj junaj geamikoj, diris Sventon, Nivalo estas danĝera.

Sed aŭskultu! Vi volonte povos enveni kaj saluti al sekretario Smito. Tio nur aspektus agrable kaj senafekte. Plej grave estas, ke li ne suspektu ion. Hodiaŭ ĉio sukcesis bone. Li kredis, ke mi estas lordo Hubardo.

—Jes, sed tio sinjoro Sventon ja estis, la lordo diris kun sincera miro.

—Do oni morgaŭ enpaŝos kaj salutos la ĉantaĝonivalon, Diko diris.

—Miaj junaj geamikoj, diris Ture Sventon. Ĉu vi poste volos helpi min ankaŭ pri alia afero?

Maria kaj Diko nenion pli volonte farus.

—Estas bone. Mi donos al vi precizajn instrukciojn, diris privatdetektivo Sventon kaj defrapis la cindron de la cigaro.

Smito-Nivalo malaperas el la biblioteko

En la posttagmezo Sventon (lordo Hubardo) sidis sola en la biblioteko, okupita de profundaj pensoj. La fajro jam finbrulis. La krepusko estis falinta super la nebulokovrita mondurbo. Regis silento en la domo, krom tiu malforta klakado, kiu ekestas, kiam osta bovidsteko fritiĝas en la kuirejo.

Sventon estingis la lampon por povi pli bone pensi. Por povi eĉ pli bone pensi, li fermis la okulojn. Post kelkaj minutoj li komenci spiri trankvile kaj profunde. La ruĝbrunaj lipharoj moviĝis supren kaj malsupren en takto kun la spirado.

La ĉambro estis nur duone mallumigita. En partoj de ĝi estis lumo de la stratlanternoj, en aliaj partoj regis profunda ĵetombro. Aŭdiĝis mallaŭta palpanta kaŝira sono, kiu ekestas, kiam paro da malgrandaj, pintaj, belpoluritaj ŝuoj sin serĉas antaŭen en la mallumo. Sed Sventon daŭre spiris profunde kaj trankvile. Viro en malgranda, bone gladita, perfida ŝevitkostumo staris nevidebla en la plej profunda ĵetombro de la ĉambro. Li tenis pistolon en unu mano kaj poŝlampon en la alia. Li eklumigis la poŝlampon kaj lasis la lumkonuson ludi sur la muroj de la biblioteko, ĝis ĝi subite trafis viron en kvadratumita kostumo kaj ruĝbrunaj lipharoj, kiu sidis en seĝo kaj dormis. Lordo Hubardo. Li tuj estingis la lampon kaj staris tute senmova. Por eviti riskon li ankaŭ ĉesis spiri.

Lordo Hubardo ne moviĝis. La viro tiam piedpinte iris en la apudan ĉambron, ankaŭ ĝi preskaŭ senluma. Tiam Hubar-

do-Sventon senbrue kiel ombro leviĝis kaj sekvis la alian ombro-
bron. La alia daŭrigis en la vestiblon. La hubarda ombro vi-
dis, kiel la malgranda ŝeviotombro haltis ĉe la ŝtuparo kaj
aŭskultis. De malproksime oni aŭdis disajn sonojn de la bo-
vidsteko, cetere ĉio estis silenta.

La eta mallarĝa ombro ĝuste metis la piedon sur la unuan
ŝtupon, kiam ankoraŭ unu ombro, orientlanda ĉefservisto,
aperis ĉe la flanko de la sventona ombro.

—Persono, kiu ne bonvolis anonci sian alvenon, faras vizi-
ton en la domo, flustris la orientlanda ombro kun serioza ri-
verenco.

—Tenu la pitolon preta, flustris Sventon.

La orientlanda ombro riverencis kaj diris, ke ĝi tenas la pi-
stolon en tuta preteco.

Dum la tempo la ŝeviotombro estis veninta duonvoje sup-
ren sur la hubarda ŝtuparo, kiu de densaj ĵetombroj estis en-
volvita en nepenetrebla mallumo. Nur pro la diversaj krake-
toj oni povis sekvi lian iron. "Ses – naŭ – dek kvar", Sventon
murmuris malrapide. Ĉiu ŝtupo nome krakis malsimile al la
aliaj, kaj pro tio Sventon sciis precize, kiom longe la ombro
estis irinta. La krakoj de la ŝtupoj ĉiam estas la unua afero,
kiun privatdetektivo lernas, kiam li venas al fremda domo en
la koro de Londono.

Sventon kaj Omaro malrapide supreniris la ŝtuparon.

—Ni kaptis lin, flustris Sventon. Nun li estas kaptita kiel en
ratkaptilo.

Omaro flustris:

—Ratkaptilo laŭ mia modesta opinio verŝajne estas la ĝusta
vorto.

La viro malaperis en la supran halon. Omaro kaj Sventon

pasis plejeble proksime al la flankoj de la ŝtuparo. Tie la ligno ne krakis. Sventon tenis sian kavaleripistolon kaj Omaro sian rezervpistolon en la plej alta preteco. Nivalo estis praktike nekaptebla, sed ĉi tiun fojon li estis fiksita. Ili supreniris paŝon post paŝo.

Subite la silento rompiĝis de terura krio. Kaj poste sibilis Fraŭlino Poli. Kaj poste sekvis krio de Beti:

—Li estas ĉi tie!

Kaj poste oni aŭdis Marian krii:

—Estas neeble lumigi la lampon!

Kaj poste kriis Beti:

—Li estas ĉi tie!

Sventon kaj Omaro daŭrigis supren, ili fikse rigardis antaŭen, sed povis nur vidi la mallumon, de kiu la hubarda domo estis kovrita. Sventon, kiu opiniis, ke Nivalo estas armita, ne volis lumigi sian poŝlampon. Se ili mem staras nevidataj sur la ŝtuparo, ili certe povos surprizataki lin.

Tiam okazis unu el tiuj tute nekredeblaj okazaĵoj, kiujn oni povas rilatigi nur al Nalo Nivalo. Sventon kaj Omaro aŭdis rapidajn krakadojn en la ŝtupoj, ili rimarkis, ke io falas kaj ruliĝas inter iliaj piedoj la ŝtuparon malsupren. Tiam Sventon lumigis sian fortan poŝlampon kaj sukcesis apenaŭ ekvidi la etan perfidan dorson de Nivalo, antaŭ ol ĝi malaperis kiel fadenbulo en la vestiblo. Ambaŭ postkuregis lin. Nivalo kuregis en la mallumo tra la vestiblo, en la apudan ĉambron kaj poste en la bibliotekon, kies pordon li klakfermis malantaŭ si kaj poste riglis.

Sventon lumigis la pordon per la poŝlampon.

—Dispafu la seruron, li diris al Omaro. La ĉambro ne havas alian elirejon.

Omaro metis kun orientana spiritĉeesto sian rezervpiston al la seruro kaj pafis. La seruro detruigis kaj Sventon artifike malfermis la pordon. Ĉio estis momenta ago.

Ambaŭ iris singarde en la ĉambron kun levitaj pistoloj.

—Levu la manojn! La ludo estas finita! kriis Sventon.

La ĉambro estis senhoma. Omaro volis lumigi la plafonlampon, sed tio ne eblis. Sventon lasis la poŝlampon lumi ĉie. La fenestroj estis fermitaj. Li lumigis malantaŭ la grandaj seĝoj, la sofo, la kurtenoj kaj en la paperkorbo. Smito-Nivalo ne troviĝis en la biblioteko.

En la pordotruo kolektiĝis jam lordo Hubardo, Joana, Beti, Maria kaj Diko. Ĉiuj ŝajnis paralizitaj de teruro, ĉiuj krom lordo Hubardo, kiu iris en la ĉambron kun sia pipo en la buŝo kaj diris:

—Vetas pordon, ke li ne estas ĉi tie. Li ne aspektis tre mirigita. Konas ĉi tion. Vetas pordon.

Sventon faris ĝisfundan esploradon de la biblioteko.

—Vetas dek pundojn, diris lordo Hubardo. Nenece serĉi. Restadas aliloke.

Sventon estingis sian poŝlampon. Li dum momento staris profundiĝinta en pensoj. Pro la malmulta lumo, kiun la stratlanternoj dissendis en la ĉambron, la aliaj ne povis vidi, kiel mirige simila al akcipitro li estas (se oni povas imagi al si akcipitron kun ruĝbrunaj lipharoj). Ankaŭ ili ne sciis, kian teruregan eltrovon li estis farinta. Li ŝovis la kavaleripiston en la poŝon kaj diris al Diko kaj Maria:

—Miaj junaj geamikoj, rigardu, ĉu ne la ĉefŝaltilo estas elŝaltita!

Maria kaj Diko estis ĝuste ekkuregontaj, kiam la lumo revenis kaj Omaro diris ĉe la pordo:

—Mi jam havis la honoron kontroli la ŝatilon. Laŭ mia modesta opinio ĝi estis elŝaltita.

Smito-Nivalo revenas

Sventon kredis, ke oni nenion plu bezonas timi en tiu ĉi vespero kaj nokto. Kun sia granda sperto li ne atendis pluan viziton antaŭ la venonta tago, kiam sekretario Smito en Societo Kato venos por forporti Polin. Ke Nivalo jam en ĉi tiu vespero faris kroman viziton, montris, ke li ne tute fidis je la informo, ke Poli restadas ĉe la veterinaro. Evidente li estis suspektema.

Ĉiuj iris al siaj ĉambroj. Lordo Hubardo iris al gastoĉambro, kaj Sventon kuŝiĝis en la ĉambro de la lordo. Li demetis la kvadratitan kaj la pendantajn lipharojn, kiujn li metis sur la noktotablon. Post momento li falis en profundan fortigan dormon kaj vekiĝis nur en la sekva mateno, kiam Beti frapetis la pordon. Ŝi estis regalonta per frua taso da teo, kaj ŝi estis ordonita ĉiam zorgeme informiĝi pri ĉies gusto kaj opinio pri teo.

—Bonan matenon, ŝi diris kaj levis la kurtenon. Kion vi deziras, kafon, teon aŭ lakton? ŝi unue demandis pro la ordo.

Sventon intencis respondi, ke li deziras kafon, kiam li ekmemoris, ke li estas en Londono. Privatdetektivo devas pensi pri ĉio.

—Bonvolu, teon, li diris.

—Ĉu estas dezirata cejlona teo, ĉina teo aŭ hinda altregiona teo? demandis Beti.

—Kion? Cejlona aŭ...? Ne gravas. Teo. Ĉu estas nebulo ankau hodiaŭ?

—Jes. Kun aŭ sen sukero?

—Kun! diris Sventon kun iom da malpacienco. Kun!

—Ĉu vi deziras kremon aŭ lakton aŭ citronon? Beti demandis neŝanceleble.

Sventon kunmordis la dentojn kaj diris:

—Kremon.

—Ĉu vi deziras ordinaran kremon aŭ kaprinan kremon?

Sventon etendis la manon al la kavaleripistolo kaj diris:

—Kafon! Donu al mi kafon!

Dum li atendis la kafon, li studis malgrandan praktikan manlibron, kiu nomiĝis "Cent manieroj esploradi en nebulo". Tie estis skribite, ke en densa nebulo (t.n. londona nebulo) kaŝsekvanta detektivo per sekurpinglo devas fiksi ŝnureton sur la jakon de la sekvata persono kaj mem teni la alian finon de la ŝnureto. En tre gravaj kazoj oni devus postiri la sekvan personon tiel proksime, ke oni kiam ajn povus atingi lin etendante la dekstran (aŭ maldekstran) brakon.

—Tiamaniere, Sventon murmuris penseme kaj legis plue.

Beti venis kun kafo kaj novbakita, bone plenigita fastobulko.

—Dankon, diris Sventon kaj mordis pecon de la bulko. La fastobulkoj de Joana pli kaj pli komencis simili la Rozo-bulkojn. Estante malsukcesa la bulko fakte estis nekutime sukcesa.

—Bonvolu havigi al mi ŝnureton kaj sekurpinglon, diris Sventon kaj forviŝis iomete da kremo de la nazo. Beti promesis havigi tiujn objektojn, kaj Sventon daŭrigis pri la fastobulko, kafo kaj manlibro.

Je la deka horo lordo Hubardo-Sventon sidis en la biblioteko kun sia kavaleripistolo en la poŝo. Lordo Hubardo estis en la gastĉambro, kie li restos dum la vizito de sekretario Smito. Dum ĉia esplorado estas grave, ke ne du ekzakte samaspektaj lordoj aperu samtempe. Nenio alia povas tiel facile kaŭzi nenecesajn suspektojn.

Diko kaj Maria streĉe atendis la alvenon de Smito. Ili jam ricevis siajn instrukciojn. Estis ekscite por ili, sed ankaŭ iom terure.

—Stulte, ke ni ne povas ricevi ĉiu propran pistolon por eviti riskon, diris Diko.

—Vi ja povas preni vian akvopistolon, proponis Maria.

—Ne estu stulta nun! Sed Diko tamen plenigis sian akvopistolon en la banĉambro kaj ŝovis ĝin en la poŝon.

Ĉefservisto Omaro estis sur sia posteno – silenta, sekrete ma kaj praktike nevidebla.

Sventon-Hubardo sidis en profunda brakseĝo kun la gamboj etenditaj kaj ŝajnis studi matenan gazeton. Li ekskuiĝis, kiam li ekvidis anoncon kun la jena teksto:

SOCIETO DE LONDONAJ UNUIĜINTAJ KATAMIKOJ

memorigas pri sia ĉiujara ekspozicio de purrasaj katoj. Koncernas la intereson de ĉiu unuiĝinta katposedanto unufoje jare permesi al sia bela dombesto esti eksponata. Kato alte taksas tian atenton kaj fariĝas poste duoble fidela. Avizoj akceptiĝas de sekretario Smito, kiu ankaŭ prizorgas venigon kaj hejmensendon de niaj kvarpiedaj amikoj.

—Ha, murmuris Sventon. Povis ĝuste pensi tion. Ĉi tie ni havas rilaton al radikala kaj metoda bando. Kaj li premis la kavaleriopistolon en la poŝo.

Ĉefservisto Omaro staris subite ĉe la pordo kaj diris:

—Estas por mi granda honoro anonci, ke sekretario Smito en Societo de Londonaj Unuiĝintaj Katamikoj estas veninta por – eĉ se okaza – vizito.

Li riverencis respektplene kaj sinjoro Smito eniris. Sventon faris preskaŭ nerimarkeblan movon per la dekstra brovo, kaj Omaro faris tute nevideblan movon per la montrofinĝro kontraŭ sia orientana pantalonpoŝo, kie li konservis sian ŝarĝitan rezervpistolon. Poste li senbrue malaperis en la vestiblon, kie li per sekurpinglo fiksas fortikan ŝnureton sur la palto de Smito-Nivalo.

—Ne, vidu, sinjoro Smito! Bonan tagon! diris Sventon-Hubbardo. La nebulo daŭras. Malvarma vetero.

Sventon rimarkis, ke Nivalo strabas pli ol ordinare malantaŭ siaj orkadritaj okulvitroj. La viro evidente estis plene streĉita.

—Bonvolu sidiĝi, diris Sventon kaj montris al senkompare profunda fotelo, en kiun Nivalo sinkis, tiel ke preskaŭ nur liaj vagantaj okuloj kaj pinta nazo estis videblaj. Per kio mi povas servi al vi? demandis lordo Hubbard-Sventon.

—Sed estas ja koncerne la katekspozicion, diris la eta viro kun afekta rido kaj baraktis iom per la kruroj, kvazaŭ li volus leviĝi el la fotelo.

—Aha! La ekspozicio! Preskaŭ forĝesis ĝin.

—Lasu min montri tie en la gazeto! La vortoj venis el profunda fotelo, el kiu sinjoro Smito faris senesperajn provojn levi sin.

—Legis ĵus la anoncon. Ĉiam kutimas diri, ke solida ekspozicio estas la plej malmulto, kion ni povas fari por niaj etaj kvarpiedaj amikoj.

—Kie estas Fraŭlino Poli? demandis Smito-Nivalo kaj rigardis en ĉiujn direktojn samtempe, post kiam li ternis. Ŝi estas sana nun, ĉu?

—Kiel nuksokerno. La veterinaro ĝuste diris, ke li neniam vidis ion similan. Vera ferstomako en tiu nuksokerno, li diris.

—Do mi kunprenu ŝin. Mi havas komfortan korbon en la vestiblo.

—Mi tuj petos mian ĉefserviston alporti ŝin, diris Sventon-Hubardo kaj premis la sonorilŝaltilon ĉe la pordo. Li ĵus faris tion, kiam ĉefservisto Omaro aperis kiel komisiita ombro en la pordotruo.

—Bonvolu alporti Fraŭlinon Poli, diris Sventon-Hubardo.

—Estos por mi granda plezuro venigi Fraŭlinon Poli, diris ĉefservisto Omaro. Persone mi ĉiam havis honestan opinion, ke Fraŭlino Poli...

—Rapidu! Babilu malpli! aŭdiĝis la voĉo de la sekretario el la fotela profundo.

—Estos por mi granda honoro dum malpli da babilado rapidi...

—Eklaboru! siblis Nivalo kaj ternis.

—Mi laŭ malgranda kapablo provos eklabori, diris ĉefservisto Omaro kaj riverencis al la seĝodorso kaj poste malaperis.

—Ĉu li ne babilas iom tro multe? diris sinjoro Smito suspekteme.

—Malfacile trovi bonan ĉefserviston nuntempe, diris Sventon-Hubardo.

—Mi scias. Mi mem havis grandajn malfacilaĵojn, diris sekretario en Societo Kato kaj ternis trifoje.

Nun aŭdiĝis piedpaŝoj kaj Smito turnis sin nervoze en la fotelo. Li trankviliĝis, kiam li vidis, ke estas knabino kaj knabo.

—Onklo, diris la knabo, ĉu ni povas eliri kaj ludi iom?

—Bona onklo! diris la knabino.

—Venu saluti unue, diris onklo Hubardo-Sventon. Ĉi tie estas sekretario Smito.

—Bonan tagon, diris Maria kaj etendis la manon.

—Kio estas via nomo, eta amikino? pepaĉis sekretario Smito.

—Maria, diris Maria.

—Kaj vi? diris Smito al Diko.

—Diko, diris Diko.

Kaj Maria kaj Diko rigardis sur la tapiŝon kaj aspektis kvaŭ ili bezonus iri al la dentisto. La kaŭzo estis, ke ili sentis iom da teruro. Sekretario Smito, kontraŭe, sentis sin iom pli trankvila. Ĉantaĝonivalo devas esti singarda, sed li ĉiam sentas sin pli trankvila, kiam li vidas du etajn modestajn gefratojn. Li cerbumis pri io konvena por diri.

—Ĉu vi faris viajn taskojn bonorde? li demandis kaj klopodis aspekti kiel kristnaskvireto.

—Nee, diris Diko kaj desegnis per la ŝupinto sur la tapiŝo. Maria rigardis la tapiŝon kaj skuis sian kapon, tiel ke la haroj falis kiel kurteno antaŭ la vizaĝo.

—Aj-aj-aj! diris onklo Smito kaj provis simili al kristnaskvireto pli ol iam antaŭe. Kial vi ne faris tion?

—Ni estas liberaj. Estas parotidito en la lernejo.

Diko kaj Maria daŭre desegnis per la ŝupinto sur la hubar-

da bibliotektapiŝo. Poste Maria haste forlasis la ĉambron, sed Diko restis ĉe la pordo kaj tiris pistolon el la poŝo. Sinjoro Smito en Societo Kato ĝuste tiam hazarde turnis sin al la pordo. Povas esti, ke akvopistolo estas akvopistolo. Ĝi tamen iom similas ordinaran pistolon. La vaganta rigardo de Smito rigidiĝis. Li eksaltis el la fotelo kaj ŝovis fulmrapide la manon en la dekstran pantalonpoŝon. Sventon same fulmrapide ŝovis la manon en la dekstran pantalonpoŝon. Diko kuris el la ĉambro. Sinjoro Smito ridis streĉe kaj tiris la manon el la pantalonpoŝo. Hubardo-Sventon ridis bonhumore kaj tiris la manon el la pantalonpoŝo.

Smito trankviliĝis, kiam li aŭdis la infanojn kuri el la ĉambro. Kaj li fariĝis eĉ pli trankvila, kiam li aŭdis ilin malfermi la eksteran pordon kaj elkuri en la nebulon. La pordo klakfermiĝis kaj en la domo fariĝis silente.

—Infanoj estas infanoj, diris Hubardo-Sventon. Mi ĉiam kutimas diri, ke infanoj estas infanoj.

—Precize, sinjoro Smito diris kompreneme kaj ŝajnigis aspekto kiel kristnaskvireto, kiu ĵus demetis la barbon kaj kiu nun kontente ridetas al la tuta kunestantaro.

Ne farinte eĉ brueton la orientana ĉefservisto subite staris meze en la ĉambro kun belega angurokato sur la brako.

—Fraŭlino Poli, li diris kaj riverencis respektplene. Mi permesis al mi alporti ankaŭ katkorbon, kiun sinjoro Smito bonvole kunportis. Kun orientana riverenco li elsorĉis korbon, kiun li metis sur la tapiŝon.

La eta sekretario apenaŭ sciis kion fari pro raviĝo. Li ŝovis la manon en la veŝtpoŝon kaj donis al ĉefservisto Omaro falsan arĝentmoneron.

—Vidu ĉi tie, mia bona viro, li diris.

—Estas por mi nemeritita honoro..., komencis Omaro.

—Babilaĉo! interrompis sekretario Smito kaj metis rapide la neĝoblankan angurokaton en la korbon.

—Adiaŭ, adiaŭ, eta Poli, diris lordo Hubardo-Sventon kaj frapetis per montrofigro sur la kovrilo.

—Societo Kato garantias, ke la kato estos hejmensendata en la sama momento, kiam la ekspozicio fermiĝos, diris Smito solene.

—Nenia urĝo, ne gravas, diris Hubardo-Sventon bonhumore kaj suĉis sian pipon. Tute nenia rapidego.

Sekretario Smito diris ĝis revido, prenis la katokorbon kaj ekkuris kontraŭ la pordo. Li ne faris pli ol du-tri etajn paŝojn, kiam li abrupte haltis. Viro en kvadratita kostumo, pendantaj lipharoj kaj pipo en la buŝo enpaŝis en la ĉambron. Lordo Hubardo.

Smito-Nivalo palpebrumis, spirblovis kaj pinĉis sian brakon. Jes, li estis veka. Li ĵetis rigardon malantaŭen. Ankaŭ tie staris lordo Hubardo.

—Pardonu, diris tiu lordo Hubardo, kiu ĵus venis en la ĉambron, al tiu lordo Hubardo, kiu antaŭe estis tie. Fariĝis terure malgaje sidi en la ĉambro. Kion diras detektivo Sventon pri partio de tabloteniso?

Sekretario Smito tiris fulmrapide sian pistolon el la dekstra pantalonpoŝo.

—Levu la manojn! li siblis kaj mem levis la pistolon.

Lordo Hubardo elsendis pacan fum nubon kaj mirigita levis la manojn. Sventon, kiu ne sukcesis sufiĉe rapide eltiri sian pezan kavaleripistolon, ankaŭ levis la manojn. Omaro, kiu en la kriza momento staris antaŭenklinita por preni cigarstumpo de la tapiŝo, ankaŭ levis la manojn.

Smito-Nivalo iris malantaŭen kontraŭ la pordo kun la katkorbo en unu mano kaj la pistolo en la alia. Li klakfermis la pordon al la biblioteko kaj provis rigli ĝin je la ekstera flanko. Tio ne eblis, ĉar sinjoro Omaro en la antaŭa vespero per bone direktita araba rezervpafo frakasis la seruron. Kiam Smito-Nivalo komprenis, ke la pordo ne estas ŝlosebla, li anstataŭe ĵetis sin al la elirejo, kaptis ĉapelon kaj palton kaj malaperis eksteren en la nebulon kun ŝnureto trenata post si.

La tri bibliotekviroj, kiuj en la hasto ne ekmemoris, ke la seruro mankas, metis ĉiuj samtempe la ŝultrojn kontraŭ la pordon kaj krevigis ĝin, kaj poste ili kun levitaj oficistaj pistoloj kuregis pluen. Ili kuris tra la ekstera pordo, kiu estis malfermita. Kiam ili alvenis al la sablopado, ili aŭdis aŭton enmeti unu rapidon post la alia kaj malaperi en la nepenetreblan londonan nebulon.

La viroj en la kelo

Kiam Smito-Nivalo faris viziton en la domo de Hubardo, tri viroj sidis en eta ejo en kelo en tute alia distrikto de la urbo kaj atendis lian revenon. La viroj estis Franco Briljanto kaj Tomaso Larsono el Stokholmo kaj ilia amiko Jimo, kiu loĝis en Londono.

La lokalo situis ĉe Nigra Strato, unu el tiuj simplaj kaj abomenaj flankstratoj, kiuj aspektas plej belaj en nepenetrebla nebulo. La keloĉambro estis malalta kaj havis malsekan plankon el tero. Sur breto kuŝis 50 rompiloj de diversaj grandecoj kaj modeloj (kelkaj faldeblaj), 600 ŝtelŝlosiloj pendis en vicoj sur najloj, plue troviĝis tie 10 vitrotranĉiloj, 2 brunaj kaj 3 grizstriaĵtutlanaj ŝtrumpoj plenaj de sablo, paro da ladmalfermiloj kaj kelkaj lanternoj. Ĉio kuŝis belaspekte vicigita. "Ĉiu ilo en sia loko" estis preslitere skribite per ruĝkreto sur blankkalkita muro.

En angulo staris ronda tablo kaj sur ĝi petrola lampo. Ĉirkaŭ la tablo staris kelkaj seĝoj vestitaj per ruĝstria ŝtofo. Sur la muro pendis brodita tapiŝo kun la teksto: "Vespera horo donas multe da oro". Du fenestrotruoj rigardis al la strato. Antaŭ la truoj pendis malgrandaj bone gladitaj bluaj kurtenoj.

Jimo estis vestita per bonega ruĝstria jako. Sur la ĉapo li havis brilan altan ĉapelon, t.n. dimanĉkruĉon, kiun li pruntis

de pelata borsmakleristo, kiu demetis ĝin, kiam li volis viŝi sian frunton per la poŝtuko.

—Ĉu vere ne plaĉis al vi hejme, demandis Jimo.

—Ne, respondis Tomaso. Mi servis en brullignejo, bona laboro, jes, bonega, sed la perspektivoj estas malbonaj en tiu fako.

—Ĉu vere, diris Jimo.

—Miaparte, diris Franco Briljanto, kiu sidis envolvita en bruna ulstro, mi laboris en rapidekspedejo, sed estas same tie. Tute malcertaj perspektivoj.

—Ĉu vere, diris Jimo.

—Antaŭe ni ambaŭ laboris en la juvelistfako, sed la tempoj malpliboniĝis.

—Jes, evidente, diris Jimo kaj ekĝemis. Sed ni ne perdu la kuraĝon. Oni devas labori energie kaj rigardi antaŭen.

—Pri tio vi tute pravas, Jimo, diris Tomaso.

—Sed diru sincere, knaboj, daŭrigis Jimo, ĉu oni povas fidi tiun Nalon Nivalon? Li deprenis la borsmakleristĉapelon kaj purigis ĝin per eta broso, tiel ke ĝi eĉ pli brilis.

—Nivalo! Vi ne konas lin. Li ĉiam helpas sin.

—Helpas sin? Jes, sed ĉu li helpas nin? miris Jimo. Mi ne konas lin, kvankam li ja ŝajnas fidinda, tion mi povas konfesi.

—Li estos ĉi tie kun la kato en kiu ajn minuto.

—Kial li ne laboras hejme? Kial li vojaĝis ĉi tien?

—Li bezonis ŝanĝon de klimato. Li sentis, ke estos pli sanige resti ĉi tie dum kelke da tempo.

—Ĉu jes, diris Jimo. Jes, se oni nur povas fidi lin.

—Oni povas bone vidi, ke li estas fidinda. Li povas trompi kiun ajn.

—Jes, eble vi pravas, diris Jimo trankviligita.

—La sola, kun kiu li havis iom da malfacilaĵoj, estas Sventon, diris Briljanto.

—Kiu estas Sventon? demandis Jimo kaj sulkigis la frunton penseme. Mi neniam aŭdis pri iu Sventon.

—Pro tio vi povas ĝoji, diris Tomaso. Sventon fakte estas unu el la plej malagrablaj homoj, kiujn oni povas imagi. Tia ulo povas fiaskigi ĉion. Kiam mi kaj Briljanto laboris en la juvelistfako, li ĉasis nin kiel hirudo kaj fiaskigis nin.

—Jes, diris Briljanto. Kelkaj homoj estas tiaj. Ne plaĉas al mi esti hejme nur pro Sventon. Nenia trankvilo en la laboro, tute nenia komforto.

—Ĉu jes, diris Jimo. Mi ja konas nek Nalon Nivalon nek tiun Sventon. Mi nur scias, ke ni devas havigi la katon. Lordo Hubardo pagos kiom ajn por rericivi ĝin. Li ne kuraĝas ofendi la maljunan sinjorinon Smiton.

—Trankvilon, diris Tomaso kaj rigardis la horloĝon. Nivalo estos ĉi tie en kiu ajn minuto. Sed Jimo, se ni nun postulos moneron por la kato, ĉu vi estas certa, ke li povos pagi?

—Ne, diris Jimo, tion li ne povos, sed li povas prunti de sinjorino Smito.

Ĉiuj tri eksplodis per laŭta rido. Estis vere hejmece tie en la kelolokalo ĉe Nigra Strato.

Nun aŭdiĝis frapoj sur la pordo – dek du frapoj en rapida takto, unu forta pugnofrapo, sep frapoj en malrapida takto kaj fine tri batoj rapide, malrapide kaj ree rapide, la interkonsentita signalo. Cetere iu piedbatis la pordon.

Briljanto iris al la pordo kaj malfermis ĝin. Ekster ĝi en la nebulo staris Nalo Nivalo kun korbo en la mano.

—Ĉu vi prenas sieston ĉi tie? li diris senpacience kaj ternis.

Nivalo metis la korbon sur la tablon. Li malfermis la kovrilon, kaj la aliaj fervore kliniĝis antaŭen por rigardi. Ili vidis angurokaton, kiu estis blanka kiel neĝo. La kato rigardis al ili per malvarmaj flave verdaj okuloj kaj estus movanta la voston en okoj, se ne estus tro malvaste en la korbo. Kiel nun estis, ĝi devis kontentiĝi per sepoj.

Ĉiuj ŝajnis tre kontentaj.

—Ĉu estis tre malfacile? demandis Briljanto simpatie, kaj Tomaso ŝovis seĝon al Nivalo.

—Nun mi skribos leteron al Hubardo, diris Nivalo. Mi intencas postuli...

—Ĉu mi? diris Jimo. Ni!

—Kion li diras? Nivalo malpacience demandis.

—Ĉu mi? Ni! diris Jimo kun sulkigita frunto.

—Iru aĉeti paperon kaj koverton kaj mi skribos leteron al Hubardo, diris Nivalo al Tomaso.

—Fariĝos, diris Tomaso.

—Kaj vi iru aĉeti fumaĵitan haringon kaj kremon! Nivalo diris al Jimo.

—Mi ne malsatas, diris Jimo sen movi sin.

—Kion li diras? Nivalo malpacience demandis.

—Li diras, ke li ne malsatas, diris F. Briljanto.

Nivalo rigardis tiel minace al Jimo, ke ŝajnis al tiu plej sekure tuj ŝovi la manon en la pantalonpoŝon. Sen ke iu povu rimarki, kio okazas, Nivalo subite tenis pistolon en la dekstra mano. Ankaŭ en la maldekstra mano li tenis pistolon. Jimo malrapide eltiris ruĝkvadratan poŝtukon el la pantalonpoŝo kaj embarasite purigis la nazon.

—Iru aĉeti haringon kaj kremon. Neniu pagos moneron

por mortintaj katoj, siblis Nivalo. Mortinta kato estas praktike senvalora.

—Mi certe volonte irus, murmuris Jimo, sed ĉi tie ne estas aĉetebla fumaĵita haringo. Pri tio mi neniam aŭdis ion.

—Do aŭskultu pli bone, kiam oni parolas pri fumaĵharingo, siblis Nivalo.

—Atendu momenton, Briljanto diris mediteme. Povas okazi, ke li pravas. Fumaĵharingo estas la samo kiel baltharingo, kaj baltharingo ne troviĝas en ĉi tiu lando.

—Babilaĉo! aŭdiĝis de Nivalo pli malpacience ol antaŭe. Baltharingo kaj fumaĵharingo ne estas la samo. Se mi petas pri kilogramo da baltharingo, mi ricevas baltharingon. Kaj se mi petas pri fumaĵharingo, mi ricevas fumaĵharingon. Ne baltharingon aŭ napokaĉon aŭ rabarbojn. Rapidegu!

—Sed mi ne havas botelon. En kio mi havigu kremon? Jimo malgaje demandis.

—En la dimanĉokruĉo, diris Nivalo, kiu povis esti senlime malica. Ĝi entenas litrojn. Rapidegu!

Jimo rapidegis.

Nivalo sidiĝis ĉe la tablo kaj cerbumis pri la letero al lordo Hubardo. Li mordis la ungojn. Liaj rigardoj iris en ĉiujn direktojn. Briljanto forbrosis iom da polvo de la palto de Nivalo. Li vidis, ke ŝnureto estas fiksita ĉe la palto per sekurpinglo. Tio ŝajnis stranga, sed li ne kuraĝis demandi.

Maria kaj Diko rakontas

Kiam la aŭto de sekretario Smito-Nivalo estis malaperinta en la nebulo, lordo Hubardo diris:

—Nun Fraŭlino Poli estas for. Kaj la bibliotekpordo ankaŭ estas for, li aldonis kaj frotis la ŝultron.

—Estus eble pli saĝe, se vi estus restinta en la ĉambro, T. Sventon diris abrupte.

—Jes, konsentis Hubardo, sed la fakto estas, ke mi sentis min ema je partio de tabloteniso. Ne ekpensis pri la malbenita katosekretario. Ĉu ni tamen interkonsentiĝu kun Scotland Yard, li proponis.

—La knaboj en Yard scias nenion pri la metodoj de Nivalo, diris Sventon.

Lordo Hubardo ekĝemis. Fraŭlino Poli for, Beti ekŝiĝas, Joana ekŝiĝas, nepagitaj fakturoj, onkloro Viktoria alvenanta. Io tia povas detruiri la plej fortan. Lordo Hubardo sentis la teron ŝanceliĝi sub siaj piedoj. Li bezonis momenton da trankvilo, kaj tial li foriris al la klubo.

Kiam li iris laŭ la strato kaj paŝis sur la flavaj folioj, kiuj kuŝis sur la malseka asfalto, li pensis pri sia bofrato Antono en la firmao Smito, Smito, Smito & Smito, kiu tiel varme rekomendis detektivon Sventon el Stokholmo. Jes, li pensis amare, se oni perdas kalsonojn, oni eble povas turni sin al Sventon. Angurokatoj estas alia afero. Kaj kiam kelkaj flavaj folioj falis sur lian ĉapelon, li pensis, ke lia patro kaj lia pra-

patro antaŭ li ĉiam turnis sin al la malnova honesta Scotland Yard je similaj okazoj.

Koncerne sinjoron Omaron, li forlasis la domon por fari rapidan viziton al kafovendejo. Joana verŝajne intencis ekŝiĝi, kaj kun araba singardemo li opiniis, ke tiaokaze estas plej sekure mem pligrandigi la kafprovizon.

Sventon siaflanke nur ĉirkaŭiris rigardante la horloĝon. Fine li stariĝis ĉe la barilpordo. Li provis rigardi foren laŭ la strato, sed apenaŭ vidis la barilpordon. Li aŭskultis streĉe. Li aŭdis aŭton veni. Nun ĝi aperis el la nebulo kaj haltis antaŭ numero 104. Estis taksio.

Maria kaj Diko elruliĝis. Ambaŭ estis tute ekscititaj.

—Onklo Sventon! Onklo Sventon! Ni scias, kie Nivalo kaj Fraŭlino Poli estas, kriis Diko.

—Bona onklo Sventon, pagu la aŭton! kriis Maria.

Diko kaj Maria rakontis. Ili tute sekvis la instrukciojn. Ili rakontis.

Ili observadis ĉe la heĝo por vidi, ĉu sekretario Smito venos per aŭto, kiel onklo Sventon supozis. Tion li vere faris. Li parkis la aŭton ekster la domo kaj eliris kun korbo en la mano. Post kiam li suspekteme rigardis en ĉiujn direktojn, li eniris tra la barilpordo. Post momento ili mem eniris kaj salutis lin. Poste ili eliris al la aŭto, kaj Diko malfermis la kofrokovrilon. Ĝi ne estis ŝlosita, do li ne bezonis uzi la ŝtelŝlosilon, kiun Sventon estis doninta al li. Ili ambaŭ engrimpis kaj klakfermis la kovrilon post si. Estis spaco por ili tie, sed ili ekhavis doloron en la nuko pro la faldita sidado. Ili malkovris, ke oni povas rigardi en la aŭton levante iom la malantaŭan benkon.

Ĝuste kiam ili estis levintaj la benkon iomete, la viro kun

la perfida nazo kaj la komforta katkorbo ensaltis la aŭton. Li startis kiel plejeble rapide, kaj estis vera miraklo, ke li ne koliziis kontraŭ iu domo aŭ alia malgranda objekto en la nebula mondurbo. Maria kaj Diko ŝtelrigardis tra la fendo sub la benko.

—Estas Nivalo, flustris Maria.

—Jes, kaj li kunhavas Polin, flustris Diko.

La korbo staris sur la planko antaŭ ili, kaj ili povis vidi la blankan katon movi sin en ĝi. La korbo staris tiel proksime, ke ili povus etendi la manon kaj malfermi la kovrilon kaj preni la katon al si, sed tio ja tute ne utilis.

Ili havis nur unu aferon por fari, nome sidi silentaj kaj nevideblaj. Ili sciis, ke sekretario Smito-Nivalo estas danĝera. Aliel oni povus pafi akvoradion sur lian nukon. Diko opiniis, ke plej ofte estas konvene pafi akvoradiojn, sed okazon tiel altgrade konvenan kiel nun, li neniam antaŭe spertis. Feliĉe li lasis kaj la akvopistolon kaj la katon.

La aŭto serpentumis antaŭen ĉiudirekten en la nebulo. Diko kaj Maria tute ne sciis, kie ili estas. Ili eĉ ne sciis, en kiun direkton ili veturas. Estis kiel iri en labirinto kun bendokovritaj okuloj.

Kelkfoje la aŭto haltis, kaj tiam ili kredis, ke ili estas ĉe la celo. Ili ne kuraĝis malfermi la malantaŭan benkon, ili kuŝis senmovaj kaj apenaŭ kuraĝis spiri. Sed estis nur stratkruciĝoj, ĉe kiuj ili haltis.

Fine ili tamen estis ĉe la celo. Tuj kiam la aŭto haltis, la motoro haltiĝis, unu el la pordoj malfermiĝis kaj klakfermiĝis. Tiam ili levis la benkon kaj ŝtelrigardis. La viro estis for, kaj same la katkorbo.

—Vidu! flustris Maria.

Tra la fendo ili povis iom vidi la viron. Li staris ekster malalta kelopordo kun la korbo en la mano. Per unu mano li faris serion da frapoj kaj batoj sur la pordo. Kiam neniu malfermis, li ankaŭ komencis piedbati la pordon. Nur tiam ĝi malfermiĝis.

—Ĉu vi prenas sieston ĉi tie? li diris per pepaĉa voĉo kaj malaperis tra la pordo.

Maria kaj Diko kuŝis senmovaj dum momento. Kiam ĉio ŝajnis kvieta, ili kun komunaj fortoj forŝovis la malantaŭan benkon kaj elkrablis. Ili sentis doloron en la nuko, kaj la genuoj estis skrapvunditaj. Rapide ili malfermis pordon kaj elsaltis.

Ambaŭ nun kondukis kun plej granda spiritĉeesto. Maria rigardis la numeron de la aŭto kaj Diko esploris la nomon de la strato kaj la domnumeron, Nigra Strato n-ro 9. Poste ili serĉis taksion. Estis necese kiel eble plej rapide reveni al privatdetektivo Sventon.

Ili sukcesis vidi liberan aŭton. Ĝi venis kiel mendita alglitante el la nebulo. La ŝoforo rigardis suspekteme la nudkapajn taŭzitajn ulojn, kiuj alkuregis lin kaj krivokis, kvazaŭ brulus ie.

—Ĉu vi havas monon? li demandis.

—Ne, sed ni pagos, kiam ni venos hejmen, diris Diko, Holanda Parkavenueo 104. Ambaŭ ensaltis kaj sidiĝis.

La ŝoforo ne aspektis tute konvinkita.

—Ni ege urĝas! kriis Maria el sia loko.

—Urĝe, jes, murmuris la ŝoforo kaj fikse rigardis en la densan laktomaron. Tamen li ekveturis.

Ĉion supran la infanoj ne tuj sukcesis rakonti. Iom post

iom ĝi malkovriĝis. La sola, kio estis interesa por Sventon estis Nigra Strato 9, la kelopordo.

Li ŝarĝis la kavaleripistolon kaj vokis Omaron. Neniu respondo. Li vokis lordon Hubardon. Neniu respondo. Tiam li malvolvis la tapiŝon sur la sablovoĵeto ekster la domo.

Momenton poste li estis malaperinta en la laktomaro.

T. Sventon venas al Nigra Strato

Sventon surteriĝis kun mallaŭta falbruo ekster domo kun Sege suspektinda aspekto. La aŭto, pri kiuj la infanoj parolis, restis tie. Verŝajne Nivalo ankoraŭ estis en la domo. Per alkutimitaj spertoj kaj rapidaj movoj Sventon kunvolvis la tapiŝon kaj kaŝis ĝin sub gazetpaperoj kaj aliaj forĵetaĵoj ĉe la domomuro. Kun ekstrema gardemo kaj la terura kavaleripistolito en la mano li proksimiĝis al la pordo. Ĝi ne estis ŝlosita. Li ŝovis ĝin, eniris kaj estis en malhela pasejo. En la fino de ĝi estis alia pordo. Li aŭskultis, sed nenian sonojn li aŭdis.

Praktikanta privatdetektivo malofte staris antaŭ pli malfacila komisiono. Sventon ne sciis, kion li povus renkonti en ĉi tiu abomena kelo. Smito-Nivalo estis konata pro sia kunlaboro kun la plej senskrupulaj individuoj. Sventon estis sola.

Li tenis la kavaleripistolon en sia levita mano kaj iris antaŭen en la pasejo paŝo post paŝo. Li aŭskultis ekster la pordo. Troviĝis homoj interne, iu iris sur la planko kaj iu klakadis per seĝo. Sventon ekprovis la pordon – ĝi ne estis ŝlosita. Li malfermetis ĝin kaj ŝtelrigardis internen.

Tie sidis Nivalo ĉe la tablo kaj mordis la ungojn. La alian viron Sventon ankaŭ konis. Briljanto. Franco Briljanto el Stokholmo. Sur la tablo staris la korbo kun la blanka kato.

—Levu la manojn! Tio venis kiel bone direktita pistolpafo de la pordo.

La du viroj ekskuiĝis. Ili aspektis konsternitaj, kaj eĉ Nivalo ne sukcesis eltiri la pistolon.

—Levu la manojn! La du viroj ne povis fari ion alian ol levi la manojn en la aeron. Nu, tiel. Nun ĉio ŝajnas pli agrabla, diris Sventon. Turniĝu!

Nivalo kaj Briljanto turnis sin. Sventon rapide tiris pistolon el la jakpoŝo de Briljanto. En la poŝoj de Nivalo li trovis du mezgrandajn pistolojn, poste unu tre malgrandan kaj fine unu neordinare grandan pistolon, kiun Nivalo konservis en speciale farita poŝo. Ĉiujn pistolojn Sventon metis en siajn proprajn poŝojn. Poste li reiris malantaŭen al la pordo. Li intencis enŝlosi la du virojn en la kelo, dum li alvokos la policon.

—Ĉu jes, Smito-Nivalo, li diris. Tiamaniere. Sed tio ne sukcesis.

Nivalo nenion respondis.

Tiam Sventon subite sentis malmolan objekton kontraŭ la lumboj. Kiam ajn detektivo sentas malmolan objekton kontraŭ la dorso, li scias, ke tio estas pistoltubo.

—Levu la manojn! kriis voĉo malantaŭ li.

Sventon povis ne fari ion alian ol levi la manojn. Nivalo kaj Briljanto mallevis la manojn. La viro malantaŭ Sventon ektiris al si la kavaleripistolon kaj komencis serĉi en la poŝoj de Sventon. Li eltiris grandan nombron da pistoloj, kiujn li redonis al la du aliaj. Estis Tomaso. Sventon tuj rekonis Tomason Larsonon en Stokholmo.

—Agrable renkontiĝi, sinjoro Sventon, pepaĉis Nivalo, kaj la du aliaj ridaĉis. Estas tiel, ke ni renkontiĝas kelkfoje, daŭrigis Nivalo, kaj la du ridegeksplodis tiel, ke eĥis en la kelo.

Sventon devis stari kun levitaj manoj en la fora angulo de

la ĉambro. La tri viroj staris ĉe la tablo, sur kiun ili metis ĉiujn pistolojn. Ili staris kaj interkonsiliĝis, kion fari.

Tiam aŭdiĝis subite voĉo de la pordo:

—Estus por mi granda ĝojo, se la sinjoroj bonvolus levi la manojn en la aeran spacon.

Nivalo, Briljanto kaj Tomaso levis la manojn. Sventon mallevis la manojn. Estis Omaro, kiu kun orientana senbrueco estis veninta kun sia rezervpisto en la mano.

—Bonege, sinjoro Omaro, Bonege! diris Sventon kaj plukis rapide al si ĉiujn pistolojn, kiam Omaro staris ĉe la pordo kaj kontrolis la aliajn per sia rezervpisto. Liaj okuloj estis nepetreblaj kiel la orientlanda nokto.

—Bonege, sinjoro Omaro, bonege! diris Sventon.

Sinjoro Omaro riverencis kaj diris:

—La adreson bonvole donis al mi fraŭlino Maria kaj sinjoro Diko.

—Kiel dirite, sinjoro Nivalo, diris Sventon, estas tiel, ke oni renkontiĝas kelkfoje.

Pro iu kialo neniu el la tri ĉantaĝantoj ridis. Ili aspektis grumblemaj kaj koleraj tie, kie ili staris kun levitaj manoj.

Tiam Omaro, kiu ankoraŭ staris en la pordotruo, sentis malmolan objekton prematan kontraŭ la lumboj, kaj voĉo malantaŭ li blekis:

—Levu la manojn!

Estis Jimo. Omaro kaj Sventon levis la manojn, la tri ĉantaĝistoj mallevis la manojn. En unu mano Jimo tenis la pistolon, per la alia li tenis la altan ĉapelon, kvazaŭ ĝi estus kremkruĉo.

Dum Jimo kontrolis Sventon kaj Omaron, Nivalo kaj liaj helpantoj kolektis ĉiujn pistolojn. Sventon kaj Omaro devis

stariĝi kun levitaj manoj en angulo. La aliaj kolektiĝis ĉe la tablo, kie ili havis ĉiujn pistolojn en oportuna distanco, se Sventon kaj Omaro estus maltrankvilaj.

—Kiel dirite, estas tiel, ke ni renkontiĝas kelkfoje, diris Nivalo per sia pepaĉa voĉo, kaj ĉiuj ĉantaĝistoj eksplodis en ridego, tiel ke la plafono povus leviĝi.

Sventon kaj Omaro staris silentaj.

—Estas tiel, ke ni povas renkontiĝi iom, de temp' al tempo, pepaĉis Nivalo, kaj la aliaj ridis, tiel ke la plafono povus disfali.

Tiam aŭdiĝis voĉo de unu el la fenestroj:

—Estas pli bone levi la manojn eble. Estis lordo Hubardo. Nivalo, Briljanto, Tomaso kaj Jimo levis konsternitaj la manojn. Sventon kaj Omaro mallevis la manojn. Lordo Hubardo, kiu malfermis la lukon, sen ke iu rimarku tion, kuŝis vizaĝaltere sur la trotuaro kaj rigardis en la kelon kun pistolo en la mano. Oni vidis preskaŭ nur liajn pendantajn ruĝbrunajn lipharojn en la malvasta aperturo.

—Venis ĝuste hejmen el la klubo, kiam mi ricevis tiun ĉi adreson de Diko kaj Maria, li diris. Pli bone, ke vi levu ambaŭ manojn eble, li diris kaj svingis per pistolo al Jimo, kiu ankoraŭ tenis la ĉapelon kiel kruĉo antaŭ si. Sen pripenso Jimo metis la ĉapelon sur la kapon kaj tri mezuroj da kremo je ĉies surprizo fluis suben sur lian vizaĝon.

Sventon esploris la poŝojn de Jimo, sed trovis nur pakaĵon da malbonodora fiŝo, kiu similis al fumaĵfiŝo.

Sventon kaj Lordo Hubardo kontrolis la tutan bandon, dum Omaro iris al cigarbutiko kaj telefonis al Scotland Yard. Ne daŭris longe, antaŭ ol oni aŭdis policaŭtojn brui sur la strato. La bruo ĉesis, bremsoj grincis, aŭtopordoj klakfermiĝis

kaj sinjoro Omaro gvidis kun orientana ĝentileco la policistojn en la kelon. Estis granda amaso da policistoj, ili venis en longa vico tra la pasejo. Unue venis granda kaj afabla ĉefpolicisto.

—Ĉu estas ĉi tie, kie estas iom da implikaĵo? li diris. Sed vidu, jimo! Jam pasis longa tempo. La tri aliajn li ne rekonis, sed en unu el la fenestrotruoj li ekvidis konatan vizaĝon. Bonan tagmezon, li diris kaj metis du fingrojn al la pinta kasko. Malvarmetan veteron ni havas!

—Povus esti iom pli varme, diris Hubardo supre en la truo. Vere bongustos taso da varma teo, kiam ni venos hejmen.

—Ĝuste kion mi ĉiam kutimas diri, deklaris la ĉefpolicisto. Sed pri kio temas nun? Li ĉirkaŭrigardis kaj gratis sin malantaŭ la orelo. Ŝajnas kvazaŭ estus iom da implikaĵo ĉi tie.

Privatdetektivo Sventon alpaŝis.

—Mia nomo, diris Sventon, estas Sventon.

Ĉiuj policistoj mirigite rigardis Sventon. Ili jam aŭdis pri li.

—Forkonduku ĉi tiujn kvar. Mi poste liveros raporton.

—Jes, sinjoro Sventon, fariĝos, diris la ĉefpolicisto kaj metis du fingrojn al la pinta kasko.

—Estas bone, knaboj, nun vi helpas vin mem, diris Sventon al la policistoj kaj ŝovis la kavaleripistolon en la poŝon.

Nalo Smito-Nivalo, Franco Briljanto, Tomaso Larsono kaj jimo estis forkondukataj. La eta kolera Nivalo rigardaĉis perfide en ĉiujn direktojn. Li ternis trifoje.

—Permesu al mi, diris Omaro kaj forprenis ŝnureton de la jako de Nivalo. Laŭ mia modesta opinio la ŝnureto verŝajne ne plu estas bezonata por la esplorklaboro.

Lordo Hubardo venis suben en la kelon al la aliaj. Tamen lertaj knaboj, tiuj privatdetektivoj, li pensis kaj gratis la katon

malantaŭ unu orelo. Tranĉilakraj homoj. Fakte. Nun onklino Viktoria povas alveni kiam ajn ŝi volas, li pensis kaj gratis la katon malantaŭ la orelo. Li dankis al Sventon dirante:

—Precize kiel mia bofrato Antono Smito kutimas diri: Nur turnu vin al sinjoro Sventon en Stokholmo, se vi estas en embaraso.

—Je-es, la afero estas ordigita, diris Sventon. Li forigis iom da polvo de la jakomaniko kaj bruligis grandan cigaron. Sed kiu pitolo estas tiu? li demandis suspekteme kaj rigardis akre la pistolon, kiun lordo Hubardo tenis en la mano.

—Ne povis trovi mian propran en la urĝo, diris lordo Hubardo. Pruntis tiun de Diko anstataŭe. Ĉiuj rigardis konsternitaj la pistolon, per kiu lordo Hubardo estis teninta la tutan krimulbandon en respekto, tiu pitolo, per kiu li fine savis ilin ĉiujn. Ŝajnis al mi, ke mi devas preni la riskon, diris lordo Hubardo. Li celis al la fenestrotruo kaj sendis bone direktitan akvoradion eksteren sur la straton.

—Estas al mi granda honoro ĉeesti dum tiu braveco sur baltkampoj, diris Omaro kaj riverencis respektplene. Estus ege valore vidi la esprimon en la vizaĝo de Nivalo, se li sciis tion ĉi.

Nun aŭdiĝis rapidaj paŝoj kaj fervoraj voĉoj en la pasejo. Estis Maria kaj Diko, kiuj venis.

—Ni prenis aŭton ĉi tien por vidi, kiel la afero solviĝas, deklaris Diko. Ni vidis la policon forveturi kun la tuta bando.

—Vi bone faris vian taskon, miaj junaj geamikoj, diris Sventon. Sed nun estas tempo por reiro hejmen. Ni prenas la tapiŝon.

En tiu momento okazis io tute neatendita.

La belega angurokato longe supozis, ke regas trafiko de

ratoj ekstere sur la strato. Ŝi ekmemoris nun, ke ŝi ne manĝis lunĉon kaj faris belan salton supren al la fenestrotruo kaj eksteren sur la straton. Ŝi tuj fariĝis kaptita de ĉifonkolektisto, kiu ĝuste tiam pasis kun sia sako kaj kiu alte taksis angurokatojn. En la sekva momento li kaj la kato estis malaperintaj en la nebulokovrita metropolo.

Reveno al Holanda Parkavenuo

Kiam la kunveno en la kelo ĉe Nigra Strato okazis, ekblovis forta nordokcidenta vento. La densa unuaklasa nebulo, kiu prave estas mondfama kaj kiu dum pluraj tagoj kuŝis super la urbo, nun forbloviĝis. La suno eklumis sur la mondurbo ĉe la rivero Tamizo.

Privatdetektivo T. Sventon el Stokholmo sternis sian tapiŝon sur la strato kaj kvin personoj je ĉies miro sidiĝis sur ĝin: lordo Hubardo, sinjoro Omaro, Maria, Diko kaj Sventon mem.

—Sidu nun senmove, miaj junaj geamikoj! diris Sventon al Diko kaj Maria. Ne sidu tiel proksime al la rando!

Li karesis per la mano la franĝon de la tapiŝo kaj diris:

—Holanda Parkavenuo 104.

Kvazaŭ levita de nevideblaj manoj la tapiŝo leviĝis en la klaran aŭtunan aeron kaj prenis la direkton al Holanda Parkavenuo. Fariĝis agrabla flugado. Kompreneble la londona nebulo estas bonega en si mem kaj plej unuaranga, kiu ekzistas, sed aliflanke oni pli bone vidas la urbon sen nebulo. Profunde sube ili vidis la larĝan trembrilan bendon, la Tamizon, kun amaso da ŝipoj el ĉiuj landoj, oni vidis la mallarĝajn stratojn kun vicoj da aŭtoj kaj busoj, kiuj el la aero nur similis al senmovaj ludiloj, kaj se ili turnis la kapon, ili vidis la grandajn parkojn Hajdparko kaj Regantparko.

—La pulmoj de Londono, diris Sventon kaj bruligis novan cigaron. La pulmoj de Londono.

—Jes, dankon, diris sinjoro Omaro, kiu pro la freŝa vento ne tute kaptis la vortojn de Sventon. Mi havas la honoron spiri konsiderinde pli bone. Nun, kiam la nebulo estis for, li tamen devis esti iom singarda, kaj li butonumis la palton pli bone ĉe la kolo.

Lordo Hubardo sidis silenta kaj cerbumis. Strangaj homoj tiuj privatdetektivoj, li pensis. Tiu ulo promesis gardi Fraŭlinon Polian, sed nun ŝi estas tiel malaperinta, kiel angurokato povas fariĝi. Neniam plu oni povos vidi ŝin. Kaj li pensis pri ĉiuj siaj nepagitaj fakturoj kaj pri onkloro Viktoria, kiu baldaŭ estos hejme. Vere strangaj homoj. Eble ili havas iom da spur-sento, sed malzorgas pri kelotruoj.

—Sed jes, sinjoro Sventon, mi ekpensis pri afero... hm... Fraŭlino Polia...?

—Bonega kato, diris Sventon. Vere nobla raso. Li proponis cigaron al lordo Hubardo, sed la lordo ne ŝatis fumi. El Anguro tiu kato, ĉu ne? diris Sventon kaj metis la cigarujon en la poŝon.

Lordo Hubardo suspiris, sed diris nenion.

—Tie mi vidas nian straton! kriis Diko kaj montris suben.

—Jes, mi vidas la domon, kriis Maria.

—Sidu senmove, miaj junaj geamikoj, por ke vi ne defalu. Oni facile povus platigi la piedan dikfingron, se ne ion alian, diris Sventon.

De malproksime sube sonis la forta tondro de la sonoriloj en la katedralo Sankta Paŭlo. Lordo Hubardo pruntis la akran kampoloron de Sventon kaj rigardis la montrilojn de la turhorloĝo. Nun ni ankaŭ malfruas al la lunĉo, li pensis. Kaj

plue li pensis pri Joana kaj suspiris. Li tuŝis Sventon sur la ŝultro kaj diris:

—Parolante pri Fraŭlino Polia...

—Vere bela ekzemplero, diris privatdetektivo T. Sventon kaj turnis sin, kaj tiam liaj ruĝbrunaj lipharoj defalis pro la freŝa vento. Ili falis malrapide suben al la mondurbo. Ne gravas, li diris al Omaro, kiu kun orientana lerteco moviĝis por kapti ilin. La esploroj estas finitaj. Sinjoro Omaro riverencis respektoplene tie, kie li sidis, kaj li rigardis la lipharojn, kiuj malrapide turniĝante falis kontraŭ la stratojn de la urbo.

Nun la tapiŝo malleviĝis kaj surteriĝis mole sur la sablopa-
do ekster la hubarda domo.

Tuj, kiam ili envenis, Betia diris:

—La lunĉo estas preta. Joana salutas kaj diras, ke la bifteko malvarmiĝas.

—Kompreneble, diris lordo Hubardo. Prefere ni tuj sidiĝu, por ke Joana ne fariĝu... mi celas, ke la bifteko ne fariĝu malvarma.

Ili sidiĝis ĉe la longa, brila manĝotablo. La suno lumis tra la fenestroj, sed lordo Hubardo ne estis gaja. Por li estis strange, ke homoj povas manĝi bovrostaĵon kaj fruktopudingon kun flava saŭco, kiam neanstataŭigebla angurokato estas malaperinta. Kia ĝojo venas de malkovro de Nivalo, kiam samtempe kato malaperas?

Ankaŭ Diko diris nenion. Lia fido al privatdetektivoj estis grave rompita.

Sventon havis bonan apetiton.

—Bonega fruktopudingo tiu ĉi, li diris kaj ŝutis pro eraro iom da salo el la salujo de reĝino Viktoria sur la pudingon. Iom tro sala, eble.

Nur sinjoro Omaro konservis sian kutiman trankvilon.

—Estis por mi granda honoro resti dum kelke da tempo en ĉi tiu feliĉa kaj saniga hejmo, li diris kaj faris kelkajn neordinare profundajn, sed samtempe facilajn kaj neĝenatajn enspirojn.

—Onklo Sventon, diris Maria. Kiel Nivalo povis malaperi el la biblioteko? Kiam la fenestroj kaj pordoj estis fermitaj kaj ĉio en ordo?

—Diras ankaŭ mi! diris Diko kun io kaĉa en la voĉo.

—Estas tro frue nun diri ion pri la tuta afero, diris Sventon.

—Diko, knabo mia, diris lordo Hubardo malgaje, vi devas pretmaĉi, antaŭ ol vi parolas.

—Onklo, diris Maria, mi aŭdis, ke Joana kaj Betia interparolis en la kuirejo pri ekŝigo.

Lordo Hubardo fermis la okulojn.

—Ili ne volas esti en domo, kie ŝteliras amaso da tubmuntistoj kaj telefonriparistoj.

Fariĝis silente en la ĉambro. Oni aŭdis nur, kiel Diko pretmaĉis antaŭ ol li diris:

—Kaj mi aŭdis, ke Joana diris, ke ŝi ne volas resti en domo, kie estas tia eterna troprizorgo koncerne la katmanĝaĵon.

Ree fariĝis silente ĉe la tablo.

Betia envenis kun telegramo por lordo Hubardo, Holanda Parkavenueo 104, Londono, Britio.

Li malfermis la telegramon kaj legis duonlaŭte:

alvenas londonon hodiaŭ vespere esperas arde polia fartas bone via onklino

La silento ĉe la tablo fariĝis preskaŭ fantomeca.

—Pardonu, diris Sventon fine kaj leviĝis. Mi iom urĝas. Vo-

jaĝos tuj al Stokholmo. Li rigardis sian horloĝon. Ĉu vi sekvos min, sinjoro Omaro? li demandis.

—Ĉar mi danke al la klimato, respondis Omaro, havas la nemerititan plezuron senti min tute resaniĝinta en la bronkoj, mi dankas pro la propono.

—Unue kafon, ĉu? demandis lordo Hubardo por tamen montri sin gastama ĝis fino.

—Estos por ni granda plezuro trinki kelkajn tasojn, Omaro tuj respondis kaj riverencis.

—Dum ni trinkas la kafon, mi raportos pri la kazo, respondis Sventon.

Neniu respondis. Sinjoro Omaro riverencis kun orientana ĝentileco.

Sventon solvas la katomisteron

Ili ĉiuj sidiĝis en la halo, kiu baniĝis en la plej brilega novembro suno. Diko kaj Maria sidiĝis sur granda skulptita kverkokesto, lordo Hubardo kaj sinjoro Omaro trovis lokon sur komfortaj seĝoj. Ankaŭ Joana kaj Beti, kiuj estis aŭskultontaj Sventon raporti pri la kazo, envenis kaj sidiĝis. Sventon mem restis staranta kun sia taso en la mano.

—Mi nur rapide liveros raporton pri la kazo, li diris kaj rigardis sian horloĝon.

—Jes, volonte, murmuris lordo Hubardo, sed ĉu estas io, pri kio oni povas raporti?

—Do, komencis Sventon, ni aŭdas misterajn sonojn en la domo, disajn tubmuntistsonojn ktp. Post tiuj sonoj sekvas ĉiam la siblado de Fraŭlino Poli. Aliflanke la salujo de Lordo Nelson restas sur sia loko.

—Kaĉokulero, diris lordo Hubardo.

—Kaĉokulero, diris Sventon, kaj same la sukerujo de reĝino Viktoria.

—Salo! diris lordo Hubardo. Ŝi kredis, ke estas sukero. Sed estis salo.

—Salujo, diris Sventon. Ĉio restas, eĉ la valora pentraĵo "Motorciklo en Egiptio" de nekonata arbargardisto. Jam frue do estas klare, ke oni volis havi Polin. Oni sciis, ke sinjorino Smito estas tre kore ligita al Poli. Do ordinara ĉantaĝokazo. Tuj, kiam mi aŭdis, ke paro da pintaj ŝuoj estis viditaj sub la

bibliotekkurtenoj, miaj suspektoj iris en difinitan direkton. Kiam mi poste aŭdis, ke la ŝuoj senspure malaperis el la biblioteko, mi estis certa pri la afero. Devis esti Nalo Nivalo.

—Jes, sed kiel li povis malaperi, kiam la pordo estis ŝlosita, la fenestroj fermitaj kaj ĉio en ordo? demandis Diko.

—Jes, rakontu, onklo Sventon, kriis Maria, kiu sidis en sia kvadratita jupo sur la malnova kesto. Ĉiuj miris pri tio, kaj ĉiuj rigardis al Ture Sventon. Eĉ lordo Hubardo dum momento montris intereson.

—Prefere demandu, kiamaniere li ne malaperas, diris Sventon kaj malplenigis sian kafotason. Kiam mi esploris la ĉambron hieraŭ vespere, mi en la kameno vidis ŝnuron, kiu pendis en la cindron. Mi volis ĝuste kapti ĝin, kiam ĝi suprentiriĝis kaj malaperis en la fumelirejon. Supozeble li dum la tuta tempo venis kaj iris tra la fumtubo.

Lordo Hubardo suspiris: Pensis, ke certe estas ia natura klarigo, li malgaje murmuris.

—Kiel vi scias, li alvenis ĉi tien meze en la hela tago. Li ŝajnis, ke li estas sekretario de katasocio, kiu ne ekzistas.

Lordo Hubardo ĝemplendis. Ne sufiĉas, ke la privatdetektivoj lasas katojn malaperi – ili ankaŭ parolas galimation pri tio, kion oni jam konas.

—Kiam li venis hodiaŭ, mi devis lasi lin kunpreni la katon, aliokaze mi neniam povus spuri la bandon.

—Jes, mi scias, diris lordo Hubardo. Mi memoras tion.

—Danke al la atentemo de miaj junaj geamikoj ĉi tie ni povis spuri la tutan ĉantaĝan teamon al Nigra Strato, daŭrigis Sventon. Oni neniam povas esti sufiĉe singarda, kiam oni havas rilatojn kun Nalo Nivalo. Mi ne kuraĝis doni Fraŭlinon Polin al li.

Ĉiuj rigardis mirigitaj al Sventon. Lordo Hubardo malfermis la buŝon, kvazaŭ li volus diri ion.

—Mi do komisiis al la provizora ĉefservisto Omaro havigi rezervkaton.

Nun Omaro riverencis kaj diris:

—Estis por mi granda plezuro iri al bone konata katkomer-cisto ĉe Bondstrato kaj elekti unu laŭ mia modesta opinio ekstreme similan ekzempleron, kiu vere ne devenas el Anguro mem, sed el malgrava antaŭurbo de Anguro, sed mi permesis al mi supozi, ke tiu malgranda diferenco ne estus videbla en la nebulo.

Lordo Hubardo leviĝis duone el la seĝo.

—Kie estas...? li diris.

Ĝuste tiam envenis Joana kun granda plado da plenigitaj fastobulkoj, kiuj estis tiel erarige similaj al la veraj fastobulkoj el la sukeraĵejo Roza en Stokholmo, ke oni devus esti praktikanta privatdetektivo por povi rimarki la diferencon. Ili estis konvene brunaj kaj plenigitaj per multe da kremo, kiu superŝvelis en ĉiuj direktoj.

—Mi ankaŭ plenigis la ujon de sinjoro Sventon, diris Joana, por ke Sventon havu fastobulkojn ankaŭ dum la vojaĝo hejmen.

—Dankon! Mi ĉiam opiniis, ke la londonaj fattobulkoj estas unuaklasaj, diris Sventon.

Ĉiu havas sian propran etan econ, kaj la eta eco de Joana estis, ke ŝi ŝatis, ke oni laŭdu la manĝaĵojn.

—Ek de hodiaŭ la domo estos tute malplena je katoj, haringoduonoj kaj fremdaj fumtubistoj, daŭrigis Sventon.

—Tiaokaze mi restos, diris Joana.

—Jes, tiaokaze, diris Beti.

—Sed Fraŭlino Poli? diris lordo Hubardo kaj ree leviĝis duone de la seĝo.

—Miaj junaj geamikoj, malfermu la kovrilon de tiu kesto, diris Sventon.

Maria kaj Diko saltis de la malnova hubarda kesto kaj malfermis la kovrilon. Svenigaodoro de kamforo unue trapenetras la halon. Poste Fraŭlino Poli elsaltis sur la halplankon. Ŝi ĉirkaŭrigardis per siaj verdaj anguraj okuloj. La densa vosto moviĝis en rapidaj okoj.

—Interesa kazo entute, diris Sventon kaj sternis la tapiŝon sur la halplankon. Sur la tapiŝon li metis la ofcistolon, fastobulkujon, kamplornon, vestosakon, kafokaserolon kaj la primuson. Li adiaŭis en ĉiujn direktojn kaj malfermis la pordon al la strato. Lordo Hubardo deziris bonan revenon kaj deklaris, ke lia bofrato tute pravis.

Sventon kaj Omaro sidiĝis sur la tapiŝon. Privatdetektivo Ture Sventon karesis per la mano la franĝon kaj diris:

—La oficejon.

Kvazaŭ levita de nevideblaj manoj la tapiŝo leviĝis de la planko kaj elflugis tra la pordo, eksteren en la klaran sunlumon.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-055-4